

La Riverego

UK -2019 en Montrealo	2	UN kaj Esperanto	17
Rekorda MeKaRo en Toronto	4	Ĉu vi konas ESF-on ?	19
Miaj du jaroj en Esperantujo	8	Jubilea UK en Lillo	23
Esperanto ĉe Radio-Canada	11	Rakonto el Ĉinio	35
Esperantujo ĉe ARE	13	La Idoj de la Suno	37



LILLE GRAND PALAIS

Accueil

La centa Universala Kongreso en Lillo

Le centième congrès mondial d'espéranto à Lille

Sur la supra foto : la belfrido de Bulonjo-ĉe-Mar



De ploro... reen, al laboro !



Yevgeniya (Ĵenja) Amis

Les espérantistes du Canada et des États-Unis sont tristes que Montréal n'ait pas été choisie pour organiser le mondial d'espéranto en 2017, mais le rêve pour le mondial d'espéranto en Amérique du Nord continue : pendant le congrès à Lille, Montréal a annoncé son intention de se porter candidate pour le congrès de 2019 !

Ni estas forirantaj al nia lasta somera E-renkontiĝo en Montrealo ĉi-junio. Jam preskaŭ elirantaj, mi lastfoje kontrolas retpoŝton. Venas mesaĝo de Mark Fettes, la prezidanto de UEA. Temas pri la montreala kandidatiĝo por UK-2017. Mi saltas super la salutoj, klarigoj kaj ĝentilaĵoj. Mia koro bategas kaj mi fulmrapide saltas al la lasta alineo... Mia koro falas... La UEA-estraro decidis akcepti la inviton al Seulo por 2017. Ni malgajnis, malgraŭ tiom da laboro, malgraŭ tiom bonega propono de la kongresejo, malgraŭ tiom da subteno en Usono, Kanado kaj tra la mondo, malgraŭ niaj du jubileoj, 150-jariĝo de Kanado kaj 375-jariĝo de Montrealo. Kiam mi



Joel Amis anoncas la intencon de Montrealo rekandidatiĝi por UK-2019

povis remeti min en pli trankvilan staton, mi relegis la leteron. Fakte, ĝi havis multajn bonajn vortojn pri Montrealo, pri la propono mem kaj pri ĉiu laboro, kiun ni faris. Mark eĉ diris, ke la estraro

havis la impreson, ke ili volonte akceptus nian proponon, se temus pri alia jaro... Resume, ili invitas nin al rekandidatiĝo !

Kiel vi povas imagi, tiu ĉi kunveno ne estis unu el la plej gajaj kunvenoj... Ni babilis, provis subteni unu la alian, kaj ni retrorigardis kun fiero ĉion, kion ni faris, eĉ se ni ne gajnis

la nomumon. Ni fieris pri nia propono, pri la plej grandioza Zamenhof-festo ene de jardekoj por bonvenigi niajn gastojn el UEA. Ni fieris, ke nia

paĝo en Facebook estis tiom populara kaj interesa, kaj ke ni ĉiam havis tiom pli da ŝatoj ol la paĝo de niaj konkurantoj. Amuze kaj neimageble, sed niaj ŝatoj kreskis eĉ post kiam ni afiŝis en Facebook la tristan foton de ploranta sciuro kaj la vortojn, ke ni malgajnis ! Ni fieris pri ĉiu subtenletero, kiu venis de tiom da usonaj kaj kanadaj kluboj. Ni sukcesis konigi Montrealon al esperantistoj tra la tuta mondo, kaj ni ricevis nekalkuleblajn « Mi tiom volas veni al Montrealo ! » en nia Facebook-paĝo de homoj ĉie en mondo. « Kion ni faru ? » « Ni rekandidatiĝu ! » estis unuanima respondo de ĉiuj venintoj. Ni gajnos la sekvan fojon, sendube ! Ja ankaŭ niaj venkintoj, Koreio, malgajnis en la konkurso por UK-2012 kontraŭ Vjetnamio, kaj, kiel ni eksciis poste en Lillo, ankaŭ lillanoj volis okazigi la UK-on de 2005 en Lillo, por marki la 100-jariĝon de UK-oj, kaj ili gajnis por 2015, por la 100-a UK.

Bone, post tiu iom trista enkonduko, mi nun rajtas diri al vi la bonan novaĵon : nun tio jam estas oficiala ! La estraroj de Kanada Esperanto-Asocio, de la Esperanto-Societo Kebekia kaj de Esperanto-USA ĉiuj unuanime aprobis subteni la rekandidatiĝon de Montrealo por la Universala Kongreso en 2019. Dum la UK en Lillo Joel Amis, la estro de la LKK por 2017, kiu aŭtomate fariĝis la LKK-estro por la kandidatiĝo en 2019, liveris tiun

novaĵon antaŭ preskaŭ 3000 personoj, salutante la partoprenantojn nome de Kanado. « Kial ne 2018 ? » vi eble demandos. Ĉar inter la du ne-eŭropaj UK-oj normale devas okazi minimume unu UK en Eŭropo, kaj niaj ŝancoj tial ne estus bonaj por tiu jaro. Kiel vi vidas, nia revo havi la kongreson en Nord-Ameriko simple prokrastiĝis kelkajn jarojn. Ni elkore dankas ĉiujn, kiuj jam promesis helpi pri la organizado de la kongreso, kaj ni garantias, ke ni trovos ion por fari al ĉiuj, kiuj ŝatus helpi ! ☺

Kion vi povas fari nun ?

- Se vi ŝatus esti en la listo de organizantoj, skribu al mi, yevgeniya.amis (ĉe) gmail.com
- Se vi ŝatas verki aŭ traduki, vi povas, ekzemple, traduki en Esperanton, ampleksigi kaj plibonigi vikipediajn artikolojn pri Montrealo kaj Kanado.
- Se vi ankoraŭ ne ŝatis nian paĝon en Facebook, ŝatu ĝin nun ! facebook.com/Montrealo.kongreso
- Se vi ŝatus gvidi iun programeron, ankoraŭ ne tro fruas pensi pri tio ! Kontaktu Joel-on Amis, kea.adm (ĉe) gmail.com
- Kaj nun... ek al la laboro !



Toronto, suno, Esperanto !

Nicolas Viau



Notre rencontre printanière annuelle, MeKaRo, a eu lieu cette année à Toronto, où un programme intéressant et diversifié nous attendait : visites diverses (en particulier des îles de Toronto), concert, etc., comme dans un vrai congrès !

Ĉi-jare estis la tria fojo, ke mi partoprenis MeKaRon, ĉi-foje en Toronto. Estis bonega semajnfino, agrabligita per belega vetero dum preskaŭ la tuta tempo.

Estis tre bona okazo renkontiĝi kun (sufiĉe multaj ! — pli ol 60) Esperantistoj, kaj konataj kaj nekonataj, kaj spertaj, kaj foje ankaŭ novuloj (eĉ estis la unua Esperanto-aranĝo de kelkaj).

La Esperanto-Rondo de Toronto bonege aranĝis la kunvenon, kiu ŝajnis al mi preskaŭ kiel vera kongreseto, kun koncerto kaj eĉ gufujo (en hotelĉambra salono).

Mi bedaŭrinde maltrafis la oficialan registriĝon en la festo-ĉambro (agrabla tute apud la hotelo) kaj la unuan manĝon en Free Times Café, kaj nur alvenis komence de la posttagmezo. Almenaŭ mi sukcesis trafi la grupon antaŭ ĝia foriro de la restoracio, kaj promenadis tra Toronto kun ĉiuj ekde tiam.

Ni pasis tra interesaj partoj de la urbocentro. Mi malbone konis la urbon, kaj nur mallonge vizitis ĝin dufoje antaŭ MeKaRo — tio do estis perfekta okazo por malkovri pli !

Poste, vespere estis interkona ludo gvidata de Sonja Lang, kiu postulis, ke partoprenantoj petu diversajn personajn informojn unu de la aliaj. Estis multe da demandoj, sed tiom da homoj kaj tiom malmulte da tempo ! Ĉiuokaze, kvazaŭ ĉiuj interkonatiĝis kaj babilis, kaj tio ja estis la celo, ĉu ne ?

La vespero estis sekvita de tre ĝuinda koncerto de Benĉjo kaj Jessica. Mi ne konis ilin antaŭ ĉi-tiu MeKaRo, kaj tre ĝojas, ke mi povis koni kaj aŭskulti ilin.

La tago finiĝis per tabulludoj. Mi ludis Skrablon en Esperanto — estis mia unua fojo — kaj ĝi estis ege amuza ! Dankon al Lunjo el Toronto, kiu kunportis sian Skrablo-ludilaron, kaj montris al ni, grupeto

de Esperanto-Skrablo-komencantoj, kiel ludi !

Jam alvenis dimanĉo... Toronto delonge estis grava nodo por trajnoj, la ĉefa transportrimedo tra Nordameriko dum longa tempo. La fervojrotonda parko Roundhouse Park, kiun ni vizitis, prezentas al la vizitantoj imponan kunigon de vagonoj kaj maŝinoj de diversaj epokoj. La grupo estis gvidita tra pluraj eksteraj ekspoziciaĵoj kaj fine la Toronta fervoja muzeo, tuj flanke de la fervojrotonda.

Mi sekve tre ĝojis viziti la Torontajn insulojn dum la posttagmezo dimanĉe. La lago kaj insuloj estas naturaj aspektoj de la urbo, pri kiuj eksterurbanoj ne kutime pensas (oni eble pli facile memoras la CN-turon kaj grandajn konstruaĵojn), kaj viziti ilin estis por mi vere bela malkovro.

Post agraba vespermanĝo en Corks Beer & Wine

Bar, kie estis tempo por multaj diskutoj ktp, alvenis la tempo de la fantoma promenado, kiu ebligis al ni vidi aliajn aspektojn de la urbo nokte.



Esperantistoj antaŭ la Ontario asembleo

La lasta vizitita loko por la plejparto de la partoprenantoj estis la konstruaĵo de la Leĝdona Asembleo de Ontario. Estis interesa gvidata vizito : aldone al politikaj klarigoj kaj la ĉambro de la Asembleo mem (kie oni voĉdonas pri provincaj leĝoj),

la konstruaĵo kaj ĝiaj diversaj partoj estis vididaj, laŭ arkitektura kaj historia vidpunktoj.

MeKaRo ankaŭ estis okazo por paroladi kun Torontanoj kaj lerni pri ilia agado. Aparte interesa estas neformalaj renkontiĝoj por paroligi komencantojn, pro tio ke renkontiĝoj kun pluraj spertaj parolantoj foje povas esti timigaj por novuloj. Espereble tiel la grupo sukcesos kreski estontece !

MeKaRo : la unua paŝo de longa aventuro

Arlyn Kerr

Depuis quelques temps Arlyn et Les Kerr vivent une « vie nomade » : ils voyagent avec l'espéranto et partagent ses leurs expériences sur leur blog : arlynkerr.blogspot.ca.

Por mi kaj mia edzo Les, nia dua MeKaRo en Toronto estis same ĝuinda, kiel nia unua MeKaRo en Otavo. Plaĉis al ni la ekskursoj kaj manĝoj, certe, sed precipe la babilado kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Eble MeKaRo havis specialan signifon por ni, ĉar ĝi estis la unua paŝo de nia longa vojaĝo ĉi-jare en Esperantujo. Dum la venontaj kvar monatoj ni ĉeestos almenaŭ kvin aliajn eventojn : la Skotan Kongreson, Someran Esperanto-Studadon (SES) en Slovakio, la Universalan Kongreson en Lillo, familian semajnon en Kastelo Greziljono kaj la Italian Kongreson. Krom tio, ni vizitos Herzbergon (la Esperanto-urbon en Germanio), kaj la Kulturalan Centron Esperantistan en La Chaux-de-Fonds,

Svislando. Inter tiuj, ni vizitos Esperantajn amikojn en Lepsiko kaj aliaj urboj, kaj ni tranoktos ĉe bonkoraj gastigantoj pere de Pasporta Servo. Kaj, post 25 jaroj de korespondado, mi esperas renkonti la unuan fojon mian korespond-amikinin en franca urbeto.

Ĝi certe estos memorinda jaro ! Se vi interesiĝas pri nia progreso, vi povas legi mian blogon ĉe arlynkerr.blogspot.com. Elektu Esperanton por verŝajne amuzaj tradukoj el la angla. Je la dekstra flanko de la paĝo troviĝas ligo al nia itinero kun mapo de la vojaĝo (Esperantaj

aranĝoj indikiĝas per stelo), kaj vi povas aliĝi por ricevi retmesaĝon kiam mi aldonos raporton. La nomo de la blogo estas Nomada Vivo, ĉar ni ne




Les kaj Arlyn Kerr

plu havas domon, nek apartamenton.

Unu (sekreta) celo de mia blogo estas reklami Esperanton. Vidu, ekzemple, la paĝon ĉe arlynkerr.blogspot.com/2014/09/esperanto.html pri la lingvo kaj pri kongresoj. (Estas eĉ foto de MeKaRo en Otavo.) Mi parolas pri Pasporta Servo ĉe arlynkerr.blogspot.com/2014/11/pasporta-servo.html kaj arlynkerr.blogspot.com/2015/01/january-update.html

Fakte, ni havas multajn ŝancojn



fanfaroni pri Esperanto, kiam ni parolas pri nia vojaĝo kun amikoj kaj aliaj personoj, kiujn ni renkontas survoje. Ili ĉiam surpriziĝas, ke ni restos tiom longe for de la hejmo, kaj ni klarigas, ke ni iros de unu Esperanto-evento al alia, restante survoje kun Esperanto-parolantoj. Plej ofte sekvas diskuto pri la lingvo kaj la Movado.

Kiam ni revenos en septembro al Seatlo, ni loĝos en nia malgranda dombarĝo ĝis la venonta vojaĝo. Eble denove al MeKaRo kaj aliaj lokoj en Esperantujo !



Sonja Lang (maldekstre), la kreantino de Toki Pona, gvidis amuz-ludojn ; ni promenis en plej interesaj partoj de Toronto kaj Benĉjo kaj Jessica (dekstre) muzikis

Miaj unuaj du jaroj en Esperantujo



Steven Horváth

Après deux ans en Esperantujo Steve a participé à plusieurs évènements, énormément amélioré son niveau d'espéranto, s'est fait plusieurs amis, et l'espéranto est devenu une partie de son quotidien. Il partage ces expériences avec nos lecteurs.

Estas jam preskaŭ du jaroj, ekde kiam mi estas engaĝita en la Esperanto-komunumo kaj, retrorigardante, mi povas diri, ke tio estis tre interesa sperto.

Mi komencis lerni Esperanton antaŭ pli ol dek jaroj, kiam mi estis en la universitato. Mi atingis kontentigan nivelon, kiam mi povis kompreni la ĝeneralan sencon de skribita dokumento, sed nenio pli ol tio. Pro miaj studoj, mi flankenmetis Esperanton. Jarojn poste mi perdis mian fotilon kaj do bezonis aĉeti novan. Mi ja aĉetis ĝin, sed, bedaŭrinde, la ŝargilo de la malnova fotilo ne taŭgis por la nova fotilo. Mi pensis : « Kial ni ne havas universalan ŝargilon ? » Post guglado kaj pripensado pri la temo,

mi revenis al Esperanto kiel solvo por alia problemo : la problemo havi universalan lingvon.

Post du semajnoj da studado por refreŝigi mian

Esperanton, mi iris al Facebook kaj aliĝis al kelkaj Esperanto-grupoj. Mi vidis, ke Kanado kaj Kebekio havas siajn Esperanto-klubojn. Mi pensis, ke eble mi ne atingis sufiĉe altan nivelon, ĉar mi neniam praktikis ĝin kun aliaj homoj. Mi do decidis iri al renkontiĝo kun kebekiaj esperantistoj.

Mia unua renkontiĝo estis interesa, por diri minimumon. Kiam mi alvenis, mi konis neniun. Mi estis nervoza, kaj kiam komenciĝis la konversacio, mi rapide komprenis, kiu estas mia nivelo de Esperanto.



Steven Horváth dum MeKaRo

Mi kredas, ke mi komprenis ĉirkaŭ 80% de la konversacio, kaj mi povis esprimi ĉirkaŭ 20% de tio, kion mi volis diri. Tio estas, antaŭ ol mi amikiĝis kun aliaj homoj. La membroj de la Esperanto-Societo Kebekia estas tre bonvenigemaj kaj grandanimaj. Kelkaj glasoj da vino tre faciligis la paroladon kun miaj novaj amikoj.

Kutime la renkontiĝoj de Esperanto-Societo Kebekia okazas ĉiujn du semajnojn, krom somero. Tio, tamen, ne signifas, ke ĝi estas la sola tempo, kiam montrealaj esperantistoj interagas. Kun amikoj, kiujn mi facile akiris, mi malkovris, ke Esperanto povas esti parto de mia ĉiutaga vivo.

Post kelkaj monatoj mi festis mian unuan Zamenhof-feston. Tio estis mia unua granda Esperanto-evento. Ni festis ĝin en la domo de la prezidanto de nia societo, Normando Fleury, kaj lia edzino,

Zdravka Metz. Tio estis la unua Zamenhof-tago en Kanado, kie ĉiuj grandaj Esperanto-kluboj tra la lando kunfestis per la interreto. Ni havis kameraojn en diversaj lokoj, tiel ke esperantistoj

tra la tuta lando povis partopreni. La temo de nia festo estis Esperanto en Kebekio. Ni ĉiuj portis diversspecajn kebekiajn manĝaĵojn. Estante terura kuiristo kaj bakisto, mi decidis fari keksojn el skatolo, kaj mi dekoris ilin per verdaj steloj kaj bluaj lili-floroj. Tiuj keksoj fariĝis neoficiala logotipo de nia Zamenhof-festo ! Mi havis bonegan tempon societumi kaj danci kun amikoj, kaj mi ankaŭ amikiĝis kun novaj homoj.

Kun la tempo, mia nivelo de Esperanto plialtiĝis, kaj mi faris mian unuan oficialan

Esperanto-vojaĝon. Ĉiujare ESK (Esperanto-Societo Kebekia) kaj KEA (Kanada Esperanto-Asocio) organizas MeKaRo-n — Mez-Kanadan



Dum sia unua Zamenhof-festo Steve estis « gangstero »



Renkontiĝon. La loko ĉiam alternas inter Kebekio kaj Ontario, kio donas al esperantistoj de la regiono la eblon renkontiĝi kaj malkovri novan urbon per Esperanto. Ĉi-jare MeKaRo okazis en Toronto. Jam estis pli ol dek jaroj, ekde kiam mi vizitis Toronton, kaj la urbo multe ŝanĝiĝis. Mi estis feliĉa vidi, ke la allogaĵoj, kiujn ni vizitis, ne estas la tipaj turistaj vidindaĵoj. Ni vizitis nekredeblajn restoraciojn, la Rondodomon (*Roundhouse*) kaj eĉ Torontajn Insulojn. Estis bonege vidi jam konatajn vizaĝojn el Kebekio kaj renkonti la esperantistojn el Toronto kaj aliaj lokoj.

Dum MeKaRo mi lernis, ke ankoraŭ neniu petis KEA-stipendion por partopreni la komunan kongreson de Esperanto-USA kaj KEA en Detrojto. Mi pensis, ke tio estus plia bonega okazo spertiĝi pri Esperanto kaj amikiĝi kun aliaj homoj. Bonŝance, mia stipendi-peto estis akceptita, kaj mi ricevis helpon de KEA por partopreni en la kongreso. Mi devas diri, ke mi havis kelkajn antaŭjuĝojn pri Detrojto. Mi pensis, ke ĝi estos danĝera loko plena je ruiniĝantaj domoj kaj malamikemaj



homoj. Ĉio ĉi ne povus esti pli malvera. Krom, bedaŭrinde, multaj forlasitaj domoj. Dum la kongreso mi havis la eblon sperti, kiel funkcias pli formala kaj oficialeca Esperanto-evento. Tie, dum mia tria “granda” Esperanto-evento, mi renkontis kelkajn konatajn vizaĝojn, kaj mi tute ne sentis min kiel eksterulon. Intertempe mia Esperanto-nivelo estis sufiĉe alta por kompreni, escepte de unu stranga vorto tie kaj jene, ĉiujn okazaĵojn de la evento kaj la konversaciojn de ĉiu esperantisto.

Nun mi kalkulas la tagojn ĝis ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto) kaj retrorigardas miajn du jarojn. Mi vidas, ke mi faris longan vojon. Kaj

temas ne nur pri mia kompreno de Esperanto kiel lingvo, sed ankaŭ pri mia kompreno de Esperanto-kulturo kaj de esperantistoj. Mi ekhavis multajn amikojn, kaj mi akiris alian kulturon. Mi sentas, ke mi ne spertos ion nekonatan aŭ fremdan ĉe ARE — mi sentas, ke mi iros al konata loko por esti inter amikoj.

(tradukita el la angla de Ĵenja Amis)

Les bienfaits de parler l'espéranto, une langue inventée

Tiu artikoleto akompanas 15-minutan intervjuon kun Normando Fleury (prezidanto de E-Societo Kebekia), Nicolas Viau kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis ĉe Radio-Canada, Unua Kanalo, la elsendo *Medium Large* kun Patrick Masbourian. Radio-Canada kontaktis ESK-on dum la Universala Kongreso en Lillo por fari elsendon pri Esperanto, kaj ni iris al la studio reveninte el Lillo, en aŭgusto 2015. Por aŭskulti la intervjuon [klaku ĉi tie](#).

Le 100e congrès mondial d'espéranto avait lieu à la fin de juillet à Lille, en France. Les espérantophones s'y retrouvent chaque année pour échanger et rencontrer d'autres amoureux de cette langue, inventée à la fin du 19e siècle pour faciliter la communication entre gens de langues différentes. Patrick Masbourian s'entretient avec trois espérantophones québécois : Normand Fleury, Nicolas Viau et Yevgeniya Amis.



Société
Les bienfaits de parler l'espéranto, une langue inventée
Le mardi 18 août 2015

23 PARTAGES



Nicolas Viau, Normand Fleury et Yevgeniya Amis Photo : Radio-Canada/Olivier Lalonde

Normand Fleury est président de la Société québécoise d'espéranto. Bien qu'aucun chiffre officiel n'existe sur le nombre d'espérantophones dans le monde, il affirme qu'on le parle dans 125 pays. [Le site Duolingo](#) compte 80 000 utilisateurs inscrits pour l'apprendre. « La langue est très phonétique, donc c'est beaucoup plus facile de se comprendre, explique-t-il. J'ai été surpris en

animant des groupes de conversation en espéranto cet été. Durant le congrès, j'ai fait cinq séances, j'avais des groupes de 25, mais de 17 nationalités différentes et on arrivait à très bien se comprendre. C'était fascinant! »

Langue régulière, langue facile

Français d'origine, Nicolas Viau a commencé à apprendre l'espéranto il y a quelques années. « Chacun a ses raisons personnelles [pour apprendre l'espéranto]. Moi, c'était que j'aime bien apprendre les langues. J'étais curieux de savoir comment fonctionne une langue artificielle, surtout une langue dont le but est d'être équitable entre personnes de langues différentes, avec une communication facilitée et relativement neutre. C'est une langue régulière, ce qui la rend facile à apprendre. »

Yevgeniya Amis est d'origine ukrainienne. Elle est espérantophone depuis 15 ans. « Au fur et à mesure, j'ai découvert cette communauté fascinante. J'ai travaillé cinq ans comme rédactrice d'une revue en espéranto. Grâce à cette revue, j'ai rencontré mon mari. On était deux concurrents pour le même poste. Il y avait une concurrence féroce! »

Reveno hejmen... kun Radio-Canada !

La aŭgusta intervjuo kun Patrick Masbourian estis tiom sukcesa, ke la ĵurnalisto volis fari unu plian elsendon pri Esperanto ! Ĉi-foje la stelulo estis Nicolas Viau, la vic-prezidanto de ESK, kaj la elsendo nomiĝas *Le retour à la maison* (Reveno hejmen). En tiu elsendo Patrick Masbourian venas al la laborejoj de homoj kun interesaj hobiaj (kiel Esperanto !), komencas la konversacion en la laborejo, kaj poste li kuniras al la renkontiĝejo — en nia kazo, al nia kunveno en Resto-Vego ! Patrick pasigis kun ni almenaŭ horon kaj intervjuis plurajn personojn, sed nur kelkaj povis eniri en tiun ĉi 6-minutan elsendon en la plej bona tempo de la tago : inter la kvina kaj la sesa vespere, dum ĉiuj revenas hejmen kaj aŭskultas radion. Pluraj miaj kolegoj tute hazarde aŭdis tiun elsendon kaj nun multaj salutas min en Esperanto ! — *Ĵenja Amis*





Esperantujo ĉe ARE



Raúl J. García

Ĉi-jare, en 2015, mi legis ion en la reto pri Esperanto. Ĝi iom interesis min, pro laboro, ĝenerala manko de tempo kaj pro studado de alia lingvo mi ne donis multan tempon al ĝi. Post mia reveno el Japanio mi pripensis pri mondaj lingvoj kaj la facileco aŭ malfacileco lerni ilin. Do, mi revenis al la temo de Esperanto kaj serĉis pli.

Ĉi-somere mi eklernis Esperanton, kaj post nelonge tra mia legado, mi lernis pri Esperantujo. Dank' al mia lingva ferio, mi nun scias, ke ĉirkaŭi sin per parolantoj de lingvo, kiun oni aktive studas, povas antaŭenigi la lernadon. Pro tiu sperto mi deziris ĉeesti iun multtagan Esperantan eventon. Per la retejo de Esperanto-USA mi malkovris, ke ja okazas kutimaj regionaj eventoj. Jen, mia okazo viziti Esperantujon ! La plej proksima kaj tempe kaj loke estis ARE, la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto.

Mi ne trovis informon aŭ konfirmon pri la venonta renkontiĝo, sed mi iamaniere tuj markis mian kalendaron laŭ la antaŭa, ĉar ĝi okazas tiun saman semajnfino. Post multaj semajnoj mi preskaŭ forgesis pri ARE, sed la vetero memorigis min. Mi

kontrolis la retejon de ESK, la Esperanto-Societo Kebekia, kaj feliĉiĝis, kiam mi vidis ĝisdatan retpaĝon pri ARE, kaj aliĝintajn partoprenantojn. Kvankam mi ne vere sciis, pri kio ĝi temas, mi fervore atendis ĝin.

Finfine, la feria semajnfino alvenis. Sabaton matene mi maltrankviliĝis, ĉar mi malfruis, kaj mi maltrafis la matenajn kaj meztagajn eventojn. Tamen, mi alvenis je la horo de vespermanĝo, kaj preta manĝi. Mi jam konis unu esperantiston, do, mi trovis lin kaj ni manĝis kune. Ankaŭ aliaj esperantistoj manĝis en la manĝejo, kaj tiel komenciĝis ARE por mi. Estis ne tre malsame de miaj lokaj renkontiĝoj. Ni ĝuis manĝaĵon kaj konversacion. Post kvinhora veturado, la manĝaĵo kaj ripozo plenigis min de energio, kaj mi pretis por la vera komenco de la renkontiĝo.

En tre bela ŝtona domo ni ĉiuj kuniĝis kaj ludis kelkajn ludojn por ekkoni unu la aliajn. Ni rakontis pri nia sperto kun la lingvo kaj ankaŭ respondis amuzajn demandojn pri lingvoj. Ne estis longa afero, sed la granda Esperanta grupo estis nova sperto por mi.

La duan tagon, dimanĉon, mi vekigis frue, por ke mi maltrafu nenion. Denove, la manĝejo iĝis centra loko por la esperantistoj, kiuj loĝis en la hotelo, "The Inn". Post kiam mi ekkonis iujn esperantistojn nur unu vesperon, mi sentis min kiel inter (iom malproksimaj) familianoj. Ĉiuj, kiuj manĝis tie, estis tre amikemaj kaj parolemaj. Tamen, eble nur duono de la partoprenantoj manĝis en la manĝejo.

Post matenmanĝo la mateno estis plena de interesaj programeroj. Ni verkis poemojn, skajpis kun s-ro Tonkin kaj aŭskultis interesajn paroladojn dum la oratora horo. Ĉi tio impresis min, ĉar mi

neniam aŭdis tiom da homoj paroli Esperante. La tuta afero ŝajnis tiel normala, kiel vojaĝi ferie al alia lando. Jen Esperantujo ! Silvero mem estas bela loko, kiu havas amuzajn aktivecojn. Mi ĝuis kajaki sur Lago Georgo, promeni kaj vidi la pejzaĝojn. Post la libera tempo kaj manĝado, ni ĝuis aktoradon, kantadon kaj aliajn talentojn dum la kultura vespero. La vespero finiĝis per Esperanta voĉtradukita filmo, kaj nokte ni kartludis.

Entute la semajnfino estis tre amuza kaj interesa ferio. Mi feliĉas, ke ARE estis mia unua sperto en Esperantujo. Ni vidu nin venontjARE !



ARE-kalejdoskopo

Jam la 22-an fojon kolektiĝis kvardeko da esperantistoj el Usono kaj Kanado por partopreni la Aŭtunan Renkontiĝon de Esperanto (ARE) en Silver Bay, Novjorkio. Ni havis plezuron bonvenigi tri francajn esperantistojn, kiuj estis en Montrealo en tiu tempo, kaj unu partoprenanto eĉ venis al ARE de fora Seatlo, Vaŝingtonio. Kiel ĉiam, ni ridis, aŭskultis prelegojn, ni skajpis kun legenda Humphrey Tonkin, ni muzikis, oratoris, diboĉis (nur iomete !), maldormis, verkis tankaojn, kunmanĝis kaj faris mil aliajn aferojn !



Ni faris suspekteblajn transakciojn



Ni gustumis floran konfitajon



Ni festis kanadan Dankofeston

Ni aspektis feliĉaj post la suspekteblaj transakcioj




Ni montogrimpis



Ni ranis

*Mortinta branĉo
pendas de elektra drat'
ambigueco
jam ne inter vivantoj
sed ne preta por la tomb'
(Joel Amis)*



Ni verkis tankaĵojn



Ni bruegis



Ni ĝuis pejzaĝojn



Ni muzikis

Unuiĝintaj Nacioj:

Celoj por Daŭripova Evoluigo

Dum la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) ni okazigis skajp-kunvenon kun Humphrey Tonkin, la iama UEA-prezidanto, profesoro pri la angla literaturo, aŭtoro kaj tradukisto. Humphrey, interalie, aktivas en la Novjorka oficejo de UEA ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, kaj li dividis kun ni kelkajn informojn pri la laboro de la oficejo (legu pli ĉe esperanto-un.org). Li ankaŭ invitis la esperantistojn al la kunlaboro : ekzemple, per helpado pri tradukoj, volontulado en la oficejo mem, aŭ simple per diskonigo en siaj grupoj de la novaj celoj por daŭripova evoluigo de UN, kiuj anstatas la famajn Jarmilajn Evoluigajn Celojn.

1. Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.
2. Forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutradon, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.
3. Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.
4. Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.
5. Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.
6. Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de akvo kaj sanitariaj sistemoj.
7. Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.
8. Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.
9. Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.



10. Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.
11. Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.
12. Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.
13. Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝiĝon kaj ties efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo).
14. Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn, kaj marajn resursojn cele al daŭripova evoluigo.
15. Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco.
16. Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj.
17. Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.

(el Vikipedio. La novaj celoj estis akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo de UN en septembro 2015, kaj ili validos ĝis 2030. Traduko de Humphrey Tonkin kunlabore kun Mark Fettes, Brian Moon, kaj Istvan Ertl, septembro 2015)



Humphrey Tonkin (dekstre) parolis dum ARE pri la laboro de la Novjorka oficejo de UEA ĉe UN



Ĉu vi konas ESF-on ?



Yevgeniya (Ĵenja) Amis

« Ĉu vi konas ESF-on ? » — « Ne, ne vere... » « Ĉu vi konas la retejon Lernu.net ? Aŭ Edukado.net ? » — « Jes, kompreneble ! Mi ofte uzas ilin, kaj rekomendas al miaj lernantoj ! » « Do, ESF estas la fondaĵo, dank' al kiu ili estis kreitaj kaj kiu daŭre subtenas ilin ! »

Tiel ofte iris la konversacioj ĉe la ESF-tablo dum la Movada Foiro de la Universala Kongreso ĉi-jare. En la kongresa sako la kongresanoj ricevis ESF-informilon kun la literoj « ESF » faritaj per logotipoj de diversaj projektoj, kiujn ESF subtenas. Interese, ke ĉiuj, kiuj haltis ĉe nia tavolo, konis almenaŭ unu el projektoj kun ESF-subteno, sed sufiĉe multaj tute ne konis la fondaĵon mem. Kvankam mi bone komprenis tion antaŭe, sed ĝuste dum tiu ĉi Movada Foiro tio frapis min eĉ pli ol kutime, kiom



Joel Amis, ESF-administranto, prezentas ESF-on dum la Movada Foiro

la famo de la projektoj, kiuj estiĝis aŭ ekzistas dank' al la fondaĵo, superas la famon de nia fondaĵo mem. Mi ne povis ne rideti, kiam kelkaj junaj kongresanoj demandis, « sed kiel oni antaŭe lernis Esperanton, antaŭ Lernu.net ?! » Se la homoj restis ĉe la tavolo por iom pli longa tempo,

ni iomete parolis pri malpli konataj projektoj, kiujn ESF subtenas :

- Nitobe-simpozioj : la serio de konferencoj, kiuj ekzamenas la lingvajn dimensiojn de eŭropa integriĝo kaj tutmondiĝo kaj kunvenigas diversajn aktivulojn, klerulojn kaj politikistojn ;
- Tekstaro.com : la korpuso de skribita Esperanto (unu mia konato el Japanio nomis ĝin « donaco de Dio », ĉar ĝi enorme helpas al li trovi ĝustan uzon de diversaj vortoj, en malsamaj kuntekstoj) ;

- Wiki-Trans : la maŝintraduko de la tuta anglalingva Vikipedio en Esperanton, kun mirinde bonaj rezultoj ;
- nia fama Nord-Amerika Somera Kursaro,
- la Biblioteko Hodler de UEA,
- instruado de Esperanto al bazlernejoj en Britio (« Springboard to Languages »)

kaj multaj multaj aliaj. La homoj estis impresitaj, kiom ESF influis al disvolviĝo kaj profesiigo de Esperantujo dum la pli ol 45 jaroj de sia ekzisto !

Dum la UK debutis du novaj libroj, kiuj ankaŭ aperis kun ESF-subteno : *UEA en konscio de esperantistoj* de Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen — tre detala sociologia esploro pri la Esperantomovado —, kaj *Gvidlibro tra Esperantio : konciza leksikono de la Esperanto-kulturo* de Aleksandro Melnikov — populara referenca libro pri aspektoj de la kultura vivo de esperantistoj. Ni havis ankaŭ du prezentaĵojn : unu tut-horan prezentaĵon pri ESF ĝenerale (fare de Humphrey Tonkin) kaj 15-

minutan prezentaĵeton dum la Tago de Lernado (fare de Mark Fettes) pri unu el la plej lastaj projektoj kun ESF-subteno : la Esperanto-kurso en Novjorko, « la urbo, kiu neniam dormas ». Tiu kurso okazis en la elita kolegio Macaulay Honors College ĉe la Universitato de Novjorko — CUNY (City University of New York). Tiu ĉi unika 10-LECIONA kurso al 12 zorge elektitaj kaj promesoplenaj studentoj de la elita kolegio (plej

altaj 0,33 % de la CUNY-studentoj !) okazis en majo kaj junio ĉi-jare, kaj ESF provizis la stipendiojn. La kurson organizis Esther Schor, ESF-konsilanto, poeto kaj profesoro de la universitato Princeton, kaj la lecionojn gvidis Bill Maxey. Pro tio, ke la kurso estis relative mallonga, ĝi ne intencis igi el la lernantoj fluaĵ esperantistoj : ĝi ĉefe volis

stimuli intereson pri plia studado kaj aliĝo al la komununo. Ĝi celis ankaŭ pruvi, ke Esperanto estas konkreta kaj utila lingvo, forviŝi negativajn supozojn pri la lingvo, montri, ke Esperanto havas siajn kulturon kaj komunumon kaj enkonduki la



Angela Tellier (Springboard to Languages) respondas la demandojn

rimedojn por lerni la lingvon, ekzemple, Lernu.net, kiun ĉiuj partoprenintoj senescepte laŭdis (« bonega », « tre helpa », « treege helpa », « superhelpa », « nekredeble helpa », « fabela rimedaro »). Alia granda celo de la kurso estis krei aron da helpantoj por la UEA-sidejo ĉe UN en Novjorko. La kurso estis sukcesego, kaj unu el la studentoj skribis : « Mi laŭgrade enamiĝis kun ĝi kaj ankaŭ sentis emon apogi la Esperanto-movadon. »

Dum nia ĉefa prezentaĵo, kiun gvidis Humphrey Tonkin, la kunfondinto kaj la plej longdaŭra prezidanto de ESF, ni estis feliĉaj vidi en la ĉambro multajn malnovajn amikojn de la fondaĵo : gvidantojn de la projektoj, kiuj ricevis aŭ daŭre ricevas ESF-subtenon. Ĉeestis interalie Ilona Koutny (gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano), Angela Tellier (aŭtoro de la libro « Esperanto as a starter language » pri « Springboard to Languages »), Detlev Blanke (la redaktoro de la « Informilo por Interlingvistoj ») kaj multaj aliaj, kiuj kun plezuro respondis la demandojn de la publiko. Humphrey Tonkin



Studentoj de la Esperanto-kurso ĉe CUNY (majo-junio 2015)

komencis la prezentaĵon per klarigo de la vorto « Esperantic », tiom malfacile tradukebla. Vere, kial « *Esperantic* kaj ne simple *Esperanto* ? », homoj ofte demandis nin, kaj la klarigo estas samtempe facila kaj malfacila : la vorto « Esperantic » signifas « tuŝanta Esperanton kaj rilatajn temojn », kiel interlingva komunikado kaj lingva justeco, do ĝi inkluzivas « Esperanton » sed

ankaŭ iras preter ĝi. « La vorto estis elpensita de ni en la espero ricevi subvenciojn de la usona registaro », diris Humphrey : « Bone, la mono neniam venis, sed la nomo ja restis. » Mi pensas, ke tiu nomo bonege transdonas la mesaĝon kaj la akademian esencon de ESF en la angla, sed traduki ĝin per unu mallonga vorto en Esperanton tute ne eblas, pro

tio oni decidis simple uzi la mallongigon ESF en Esperanto.

Fine de la prezentaĵoj ni invitis la esperantistojn kunlabori kun ESF, uzante kaj reklamante niajn projektojn, aŭ volontulante, ekzemple, ĉe Lernu, kiu ĉiam bezonas tradukistojn kaj lingvohelpantojn — aparte nun, kiam la teamo

prepariĝas al la lanĉo de la renovigita retejo. Ni ankaŭ klarigis, kiom grave estas subteni ESF-on per donacoj : ja la fondaĵo ne ricevas monon de iuj ajn registaroj, nek ricevas membrokotizojn, do ĝi tute dependas de donacoj de esperantistoj por daŭre subteni la projektojn, kiel Lernu, Edukado, Interlingvistikaj Studoj en Poznano, kiuj grandiĝas kaj ampleksiĝas kun la tempo, kaj ankaŭ por trovi monon por investi en novajn iniciatojn. Ni ofte menciis la nomojn de Cathy kaj Bill Schulze, dank' al kies heredaĵo ESF sukcesis fariĝi tiom grava parto de la Esperanto-movado. Mi pensas, ke ili estus tre fieraj vidi, kiajn fruktojn portis ilia kontribuo al ESF ! Mi elkore invitas ankaŭ vin, karaj legantoj, konsideri fari donacon al ESF, ĉu unufojan, ĉiumonatan aŭ planitan. Viaj donacoj helpas al la nunaj kaj venontaj generacioj de esperantistoj, same kiel la donaco de Cathy kaj Bill Schulze helpis kaj helpas al nunaj kaj sekvaj generacioj lerni Esperanton, enprofundiĝi en la Esperanto-kulturo kaj levi la profesian nivelon de Esperantujo !

Kiel donaci donaci al ESF :

- Rete : esperantic.org/donacoj (eblas donaci unufoje aŭ ĉiumonate)
- Per UEA : UEA-kodo « esfo-p »
- Per ĉeko : COP Ste. Catherine, CP 60502, Montreal, QC H1V 3T8, Canada.

Interrete

Ĉu vi serĉas retejon kun helpi lerni Esperanton al franclingvanoj ? Vizitu [Lernejeton](http://lernejeton) ! Ĝi havas plurajn lernigajn videojn, klarigojn pri gramatiko, recenzojn de libroj, ligilojn al utilaj rimedoj, rekomendojn de legaĵoj (kie aperas eĉ nia *Riverego* !), muzikon kaj multe pli !

lernejeto.wordpress.com

Tre bona artikolo kaj intervjuo pri Esperanto aperis ĉe NPR (usona Nacia Publika Radio). La artikolo titoliĝas *Esperanto Is Not Dead : Can The Universal Language Make A Comeback?* — *Esperanto ne estas morta : ĉu la universala lingvo povas reveni ?* tiny.cc/u79v4x

Vidu la mapon de Esperanto-organizoj en Kanado : bit.ly/mapEoCa. Ĝi utilas por trovi homojn proksime, por viziti lokojn dum vojaĝoj aŭ simple por montri, ke ni ne malmultas kaj konstante kreskas ! Surmapigu vin ĉe bit.ly/mapEoCaForm. Kontaktu la administranton de la mapo por korekti aŭ aldoni informojn : mateo416+mapo@chegmail.com.



Malvarma vetero... varmaj koroj !

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

Pour la 100e fois dans l'histoire, les espérantistes se sont réunis pour le congrès mondial d'espéranto, cette fois-ci à Lille, à environ deux heures de Boulogne-sur-Mer, où a eu lieu le premier congrès mondial d'espéranto. Notre rédactrice a eu la chance de faire partie de ce rassemblement impressionnant de presque trois mille personnes.

Nur du horojn de la loko de la fama unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar, en Lillo, denove kunvenis homoj kun homoj jam por la centa universala kongreso. Foje tio sentiĝis kiel songo, kaj mi trovis min revanta kaj provis imagi, kiel tio sentiĝis esti la unuaj kongresanoj ? Kiom da ĝojo paroli Esperanton la unuan fojon kaj kompreni la aliajn ! Kiom da revoj por la estonteco de nia lingvo kaj nia mondo !

Alveninte al Lillo post du tagoj en varmega Parizo mi tuj komprenis, ke mi povintus lasi la sunkremon hejme kaj preni unu plian puloveron irante al nia norda kongresurbo... « Eĉ se mankas ĉe ni la suno en la ĉielo, ĝi neniam mankas en la koroj de niaj homoj », ni lernis rapide de la lokanoj. Pasinte unu semajnon en la urbo, ni plene konfirmis la diraĵon : tra la tuta kongresa semajno pluvetis pli-malpli konstante, kaj la temperaturo variis inter 10 kaj 18 gradoj (« Tiom



La ne-esperantistaj kelnerinoj provis paroli kun ni esperante dank' al enkondukaj kartetoj disdonitaj de la kongres-organizantoj al apudaj komercoj

malvarme ? En somero ? En Francio ! » — miris kelkaj kongresanoj). Nur la lastan tagon de la kongreso la ĉielo liberiĝis kaj eliris suno... eble por sekigi niajn ĝisrevidajn larmojn... Oni instruis al mi ankaŭ amuzan manieron distingi la lokanojn disde turistoj : la lokanoj ne portas ombrelojn ! « La koroj de ni, la norduloj, estas tiom varmaj, ke la gutoj tuj elvaporigis », diris mia nova amiko, kiu naskiĝis en tiu ĉi parto de Francio. Mi respondis, ke ankaŭ mi kreis unu metodon : la nelokanoj portas kongressakon, ofte promenas en grupoj kaj parolas lingvon, kiun la lokanoj ne komprenas (jes, mia metodo ne estas perfekta : ĝi funkcias nur unu semajnon ☺). Tamen, senŝerce, kiam mi komencis atenti, mi ja konstatis, ke multaj homoj

eĉ dumpluve promenas aŭ biciklas sen ombreloj aŭ pluvmanteloj. Kelkaj hazardaj renkontiĝoj kun lillanoj konfirmis ankaŭ la duan parton de la diraĵo : ofte la lokanoj, aŭdinte la « strangan lingvon », venis babili kun ni kaj kun sincera scivolo demandis pri nia lingvo — unu fojon ni babilis dum almenaŭ 30 minutoj kun unu lillano pri Esperanto, lingva imperiismo, politiko kaj mil aliaj aferoj. Ni estis rande de eltrovi la solvojn por ĉiuj tutmondaj problemoj, kiam ni devis subite haltigi la konversacion, ĉar lia filineto, tedita de nia tro longa konversacio, eniris en la ŝofor-seĝon de lia aŭto kaj preskaŭ startis ĝin, je la teruro de la patro.

Ĉapeloj kaj rozoj

Kiel organizi jubilean kongreson por preskaŭ tri mil personoj ? Kun multe da laboremo kaj entuziasmo de la loka grupo kaj landa asocio, kaj, jes muulte da helpo de esperantistoj el la tuta mondo ! Kiam, fine de la kongreso, oni invitis la Lokan Kongresan Komitaton kaj ĉiujn volontulajn helpantojn iri sur la scenejon, ĝi estis tutplena ! La LKK-anoj fiere portis vakerecajn ĉapelojn kun la literoj « LKK », kaj la helpantoj havis rozon : la signo de dankemo pro ilia laboro por la kongreso. Ankaŭ mi ĝoje ricevis mian rozon ! Mi volis esti volontulo por lerni pri kongres-organizado por la

estonta Montreala UK, sed mi iom timis maltrafi programerojn pro la volontulaj devoj. Bonŝance, estis multaj aliaj volontuloj, tiel ke ni ĉiam laboris en grupoj kun du aliaj personoj, nur du-foje tage po 1-2 horoj kaj nur en la tagoj, por kiuj ni akceptis la taskon (mi elektis la unuajn du tagojn de la kongreso, kiam la laboro aparte multas), do, mi preskaŭ ne maltrafis la programon. Mi ne nur spertiĝis pri la kongres-organizado, sed ankaŭ plenkore ĝuis tiun ĉi sperton, ĉar, laborante, mi amikiĝis kun aliaj volontuloj, havis la okazon interŝanĝi kelkajn vortojn kun malnovaj amikoj inter la registriĝoj kaj, plej grave, mi havis la agrablan taskon bonvenigi la kongresanojn ! La centa kongreso, ĝi tamen ja estis la unua kongreso por granda parto de la venintoj, kaj ili eble portos tiun unuan kongresan memoron tra sia tuta vivo. La registriĝa proceduro estis treege simpla : la kongresanoj donis al ni sian flavan karton kun nomo kaj kongresnumero, kiun oni ricevis de UEA perpoŝte, kaj interŝanĝe ili ricevis la nomŝildon, biletojn por programeroj kaj la kongressakon. Ni



Ĵenja aparte ĝuis la volontulan sperton

rajtis registri homojn sen la magia karto, nur se ili havis sian kongresnumeron kaj identigilon kun foto, sed ni devis forsendi la homojn sen la kongresa kodo al la tablo por problemaj kazoj. Mi estis malsevera kontrolanto kaj helpis al homoj, kiuj forgesis la karton, trovi sian numeron en la kongreskatalogo, kaj ne petis identigilojn al ĉiuj, kiujn mi konas. Ni, la volontuloj, ne povis ne

iomete ridi, kiom antikva kaj multekosta estas tiu ĉi sistemo de la flavaj kartoj, sendataj per poŝto, kaj kiom pli facile estus simple montri la konfirmon per la poŝtelefono, kiun havas pli-malpli ĉiu kongresano...

Centa... unua... unika...

En la ĵus aperinta libro « UEA en konscio de esperantistoj » mi legis, ke la renkontiĝoj kun

amikoj dumkongrese estas multe pli gravaj ol la programo por la plejparto de la partoprenantoj, laŭ la enketo pri UEA. Tio signifas, pli-malpli, ke eĉ se programo ne okazus entute, la homoj tamen estus feliĉaj simple pro la eblo paroli Esperanton kun aliaj homoj, revidi malnovajn amikojn kaj konatiĝi kun novaj personoj. Mi povas atesti pri

tio, ĉar, kiam mi skribas tiujn vortojn, du monatojn post la kongreso, mi pli klare memoras ĉiujn interparolojn, ĉiun komunan manĝon kaj ĉiun ridon kun amikoj ol kiun ajn programeron (mi rimarku parenteze, ke estis multaj bonegaj programeroj, tamen, ne ĉiu programero estis elstara, kaj en kelkaj prelegoj homoj simple dormetis...). Unu tian renkontiĝon mi memoras aparte kare : atendente en Parizo la trajnon al Lillo, mi aŭdis iun diri mian nomon. Estis unu el miaj retaj amikoj, kiun mi ĝis tiam ne konis persone. Estis kortuŝe, ke li rekoni min tie, en Parizo, sur la homplena kajo, neniam vidinte min antaŭe ! Mi povas nur imagi, kiom feliĉaj estis la unuaj kongresanoj vidi la unuan fojon siajn korespond-amikojn, kies vizaĝojn ili verŝajne ne konis, malsimile al ni, kiuj vivas en la epoko de Facebook.

Ĉiu universala kongreso estas unika, sed la « kernaj » programeroj ripetigas de kongreso al kongreso : la kvar plej grandaj kaj atendataj eventoj estas la solena malfermo, solena fermo kaj la du grandaj koncertoj : la nacia vespero, kie



Dum ĉiu kongreso okazas ekumena diservo en Esperanto

la gastiganta lando kaj regiono prezentas sian kulturon, kaj la internacia vespero — la foiro de Esperanto-talentoj. Proksimume duono de la kongresanoj havis la ŝancon spekti tiujn kvar eventojn « vive », dum la alia duono devis vidi ilian projekciadon sur la grandan ekranon, ĉar la ĉefa salono ne povis enteni ĉiujn 2700 kongresanojn (mia edzo estis inter la frualiĝintoj, kiuj rajtis eniri la ĉefan salonon, sed li bonkore proponis al mi sian sidlokon en la ĉefa ejo — bone, mi ja ankaŭ devis fari la fotojn por *La Riverego* ! 😊). Unu el la plej atendataj momentoj de la solena malfermo por multaj kongresanoj estis la salutoj de la reprezentantoj de Landaj Asocioj (dum kiu mia edzo, Joel Amis, solene anoncis intencon de

Montrealo rekandidatiĝi por la UK en 2019) kaj, kompreneble, la solena parolado de la prezidanto de UEA. Mark Fettes, la nuna prezidanto de UEA, faris la centan malferman parolon multe inspirite de la unua kongresparolado de Zamenhof, kaj li interplektis multajn ĝiajn citaĵojn en sian parolon : « Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta

estas nia kunveno ; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo ; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo... », diris Zamenhof antaŭ cent dek jaroj. Bone, post cent kongresoj, eĉ se la revo de Zamenhof ankoraŭ ne tute efektiviĝis, la inaŭguraj vortoj de la centa kongreso ja estis aŭdataj en ĉiuj landoj, pro la miraklo de interreto kaj la viva elsendo. Dank' al mirinda laboro de la kongresa teamo, la evento diskoniĝis ne nur en Francio, sed ankaŭ tra la mondo : fakte, dum la UK, Radio-Canada kontaktis Esperanto-Societon Kebekian kun la peto intervjui nin, kion ni faris reveninte al Montrealo (vidu pli sur p. 11-12). La nombro de politikistoj kaj aliaj gravuloj, kiuj sendis siajn salutojn okaze de la centa kongreso aŭ kiuj eĉ venis persone, estis ankaŭ absolute miriga. Por la centa kongreso, la lastan fojon, venis saluti la kongresanojn d-ro Zaleski-Zamenhof — la nepo de Zamenhof, kiu dum tiu ĉi kongreso deklaris sian emeritiĝon de tiu ĉi agrabla devo saluti la kongresanojn, transdoninte tiun ĉi taskon al siaj du filinoj.

Dum la nacia vespero la ĉeestantoj faris virtualan vojaĝon pere de muziko kaj dancoj tra diversaj partoj de Francio-la-Heksagono, kaj apartan

atenton ricevis Jacques Brel, fama franclingva belga kantisto. Kial omaĝi belgan kantiston en Francio ? Ĉar la regiono, kie situas Lillo, estas parto de Franca Flandrio, kaj ĝi troviĝas tuj apud Belgio. Dum la naciaj vesperoj kutime koncertas profesiaj muzikistoj de la gastigantaj landoj, sed en tiu ĉi nacia vespero ni vidis sur la scenejo ankaŭ multegajn vizaĝojn de nia talentaj gastigantoj, la francaj esperantistoj ! Dum la vespero oni prezentis al ni specialan kongresanon — la giganton Jacques (vidu la bildon), la samnomulon de la kantisto, kiu eĉ ricevis



La giganto Jacques ricevas diplomon de la prezidanto de la Akademio de Esperanto



Kun la francaj gigantoj, la « prauloj » de kebekiaj gigantoj

specialan diplomon de la prezidanto de la Akademio de Esperanto ! (Kiel ni eksciis, la kebekianoj ne estas la solaj en la mondo, kiuj « promeniĝas » la figurojn de niaj gigantoj dum la festoj : tiu kebekia tradicio venas de Nord-Francio kaj Belgio, kaj kiam ni menciis al lokanoj, ke ankaŭ en Kebekio ekzistas la sama kutimo, ili estis agrable surprizitaj : ili pensis, ke tiu kutimo ekzistas nur en Eŭropo !)

La internacia vespero sekvis iomete alian modelon ol dum la antaŭaj kongresoj : anstataŭ aŭdi multajn partoprenantojn, oni per ĵurio elektis



La koncerta programo de UK estis nesuperebla!

nur la plej talentajn el ĉiuj aliĝintoj, kaj tiuj artistoj ricevis pli da tempo ol oni kutime donas al unu persono dum Internacia Vespero. Mi pensas, ke tio estis bona elekto, ĉar la kvalito de tiuj artistoj estis absolute nekredebla. Fakte, la tuta muzika kaj arta programo de la UK estis elstara :

Esperanto-muziko aŭdiĝis ne nur preskaŭ ĉiam en la kongresejo, sed ankaŭ en la urbo, sur la urba

placo, apud la stacidomo kaj en aliaj lokoj — kaj por la esperantistoj, kaj por la ne-esperantistaj aŭskultantoj (jen praktika respondo al la demando, ĉu Esperanto havas sian propran kulturon ☺).

Dank' al artikoloj, elsendoj, inform-standoj, afiŝoj ĉie en la urbo, enkondukaj kursoj por novuloj kaj, kompreneble, la koncertoj, la lillanoj havis mil

okazojn konatiĝi kun Esperanto.

Plej memorindaj programeroj por mi estis la ekumena diservo en Esperanto en la belega novgotika preĝejo Saint-Maurice, kie ni kantis la Odon al Ĝojo, kaj la tradicia Esperanto-aŭkcio, gvidata de multaj jaroj fare de Humphrey Tonkin, nia elstara oratoro kun enciklopediaj konoj pri la Esperanto-Movado. Humphrey sukcesis

interplekti Esperanto-historion kun personaj anekdotoj kaj krei spontane amuzajn rakontojn ligitajn al la vendaĵoj, kaj ĉio ĉi okazas en la fulmrapida ritmo de la aŭkcio. La plej multekosta aŭkciero (vendita kontraŭ 1100 eŭroj !) estis letero de Zamenhof, subskribita kaj de li mem kaj de Klara Zamenhof (kaj pro tio aparte rara). Humphrey ridigis ĉiujn partoprenantojn per la rakonto, kiel li ricevis tiun ĉi leteron : li ne estis hejme, kiam oni venis liveri tiun registritan valoraĵon : « Mi iras al poŝtoficejo por ricevi leteron de Zamenhof », li diris al la edzino irante al la poŝto por la letero, « mi sciis, ke la usona poŝto estas malrapida, sed tiom malrapida ?! »

La teatra revado

Ĉiumerkrede la kongresejo estas tute fermita kaj la programo ne okazas entute : tio estas la tago plene dediĉita al la ekskursoj, kaj, eble, la sola tago, kiam ĉiuj, inkluzive de la laborantoj de UEA, povas ĝui la kongreson. Estas facile forgesi, ke kelkaj el ili (ekzemple, Ionel de la

libroservo) spertas nur unu programeron : tiun, en kiu ili mem laboras... Ni partoprenis du ekskursojn : tuttagan ekskurson al la famaj lokoj de la unua mondmilito, en la ekskursotago, kaj ni faris duontagan viziton al Bulonjo-ĉe-Maró unu



Tie antaŭe staris Zamenhof !

tagon poste. Dum la ekskursata tago al Bulonjo-ĉe-Maró venis ses (!) aŭtobusoj, eĉ se tiu ĉi ekskurso estis elĉerpita sufiĉe rapide (kiam ni aliĝis, lokoj ne plu estis haveblaj). Ni aŭdis de la optimistoj, ke tiu ĉi evento estis la plej grandioza kaj kortuŝa evento, kiun ili spertis, kun la inaŭguro de la busto al Zamenhof, manifestacio, la paroladoj de la prezidanto de UEA kaj la urbestro de Bulonjo-ĉe-Maró en la fama unua kongresurbo, feste ornamita de Esperanto-flagoj. La pesimistoj plendis pri tro da oficialaĵoj, prokrastoj en la programo kaj tro malfrua tagmanĝo... Nia tago en Bulonjo estis certe malpli grandioza, ĉar ĝi okazis unu tagon post tiuj ĉi solenaĵoj, sed ne malpli interesa :

ni vizitis la teatron, kie okazis la unua kongreso kaj kiun ni, esperantistoj, vidas tiom ofte sur fotoj ; ni



Esperanto-flagoj abunde ornamis Bulonjon-ĉe-Mar

eniris sur la scenejon, kie staris Zamenhof ; ni vidis la ekspoziciojn kaj ni reaŭdis la unuan kongresan paroladon. Mi pensas, ke mi komprenis ĝin pli profunde kaj rimarkis aferojn, kiujn mi antaŭe preteratentis, interalie, kiom Zamenhof omaĝis sian antaŭulon, la kreinton de Volapuko. Sidante en la sama teatro kaj spirante ĝian aeron, mi kvazaŭ provis kapti kaj fiksi en mi la vibroj de tiu ĉi loko. Mi scivolas, ĉu la unuaj kongresanoj same plendis pri vetero, kiel ni ? Ial



mi certas, ke jes... Mi ankaŭ certas, ke ili krokodilis (eble eĉ pli ol ni...), parolis pri manĝaĵoj, demandis unu la alian, kiel oni dormis, kaj faris ĉion, kion ankaŭ ni faras dum ĉiu kongreso. Mi pensis pri la miraklo de Esperanto kaj la miraklo de tiu ĉi teatro, kiu defiis la tempon kaj la du mondmilitojn, kaj kiu konserviĝis pli-malpli ekzakte tia, kia ĝi estis en la tempo de Zamenhof.

Pasinte tro da tempo revante kaj farante fotojn sur la scenejo de la teatro, mi maltrafis la grupan foton, kaj kun mi, mia edzo kaj nia montreala amiko, Nicolas, kiuj jam plurfoje suferis pro mia malatentemo kaj la emo perdiĝi en la plej maltaŭgaj lokoj : unu fojon eĉ antaŭ la UK, en Parizo, kie mi sukcesis perdiĝi sur Eiffel-turo. Konsilo de spertulo : kiel ajn tio tentas vin, neniam perdiĝu en la Eiffel-turo, aparte sen poŝtelefono, mono kaj ŝlosilo de via apartamento !

Kanada Francio

Nia tuttaga ekskurso ne estis la plej ĝojiga, ĉar ni vizitis lokojn, kie pereis centmiloj da homoj de ĉiuj originoj, en la koro de la okcidenta fronto de la Unua Mondmilito : terura, sensenca, kruela milito, ofte forgesita pro la eĉ pli terura kaj

kruela sekva milito... Estis malfacile esti tie, promeni sur la lokoj, kie kuŝas ostoj de tiom da viktimoj de tiu ĉi ludo de povo kaj potenco je la kosto de homaj vivoj.

La unua loko, kie haltis nia aŭtobuso, estis la nekropolo Notre-Dame-de-Lorette, konata ankaŭ kiel la Monteto de morto, ĉar nur dum la unuaj 12 monatoj de la milito tie pereis 100 mil personoj...

Inter la perfektaj vicoj de blankaj krucoj (kun la nomoj ambaŭflanke) kaj en la apudaj kampoj daŭre kreskas ruĝaj papavoj, kiuj fariĝis en multaj landoj la simbolo de la viktimoj de tiu ĉi milito, kaj poste la simbolo de la viktimoj de ĉiuj militoj, pro la poemo « En Flandraj Kampoj » (« In Flanders Fields ») de John

McCrae. Kanada kuracisto kaj soldato, li perdis sian tre bonan amikon en la batalo de Ipro, en la belga parto de Flandrio : unu el la plej sangoplenaj bataloj, kie la germanoj, la unuan fojon en la historio de militoj, grandskale uzis kemiajn armilojn (John mem estis ĥirurgo dum tiu ĉi batalo). S-ro McCrae notis, kiom rapide kreskas la ruĝaj papavoj sur la tomboj de la soldatoj kaj estis inspirita verki tiun ĉi poemon (li mem mortis



Tie troviĝas nomoj de duonmiliono de mortintoj...

kelkajn jarojn poste kaj estas entombigita en Bulonjo-ĉe-Mar). Tiu loko estas trankvila, serena kaj silenta, kaj ĝi kvazaŭ invitas vin kuŝi tie, sur la herbo, kaj spekti la nubojn pasi sur la blua ĉielo. Pasintjare tie estis malfermita enorma monumento al ĉiuj viktimoj de la Unua Mondmilito pereintaj en tiu 90-kilometra zono de la okcidenta fronto. Ĝi estas en la formo de enorma ringo : 3 metrojn alta kaj 350 metrojn laŭ la perimetro, sur ĝi estas gravuritaj la nomoj de pli ol duonmiliono da pereintaj soldatoj, sendepende de tio, por kiu flanko ili batalis, de ilia religio, grado aŭ lando, ja la morto kaj sufero havas nek



religion, nek hieraraktion nek landon... « Ni ne restos ĉi tie longe, do, serĉu vian nomon sur la ringo. Vi surpriziĝos, sed eble vi trovos, ke iu el viaj praavoj kuŝas ĉi tie », diris nia ekskursgvidanto. Surprize, multaj el nia buso ja trovis la homojn kun sia familinomo. Mi vidis sur la muro kelkajn gravuraĵojn kun la familinomo de mia edzo — tiu nomo ne estas tre ofta, do, povas esti, ke ankaŭ kelkaj el niaj parencoj kuŝas tie ĉi, en flandra kamp'...

Alproksimiĝante al nia sekva halto — en la komunumo Vimy, nemalproksime de Notre-Dame-de-Lorette —, nia ekskursgvidanto diris : « Kaj nun ni iros al Kanado ». La ekskursanoj

ridetis kaj ne tre serioze prenis tiujn ĉi vortojn, sed ni rapide komprenis, ke ni ja iras viziti parton de Kanado en Francio ! Tiu ĉi loko estas tiom speciala por kanadanoj, ke Francio donacis al ĝi centhektaran pecon de tero, kie miloj da kanadanoj batalis (kaj gajnis) la batalon de Vimy, kaj kie miloj trovis sian lastan ripozejon. Nun tie estas parko kun grandioza monumento. Tie, en Vimy, la unuan fojon kolektiĝis ĉiuj kvar kanadaj bataljonoj, kaj ĝi estas konsiderata kiel loko, kie naskiĝis la sento de kanada identeco. Mi studis pri tiu ĉi loko nur kelkajn monatojn antaŭ tiu ĉi vojaĝo, por la kanada civitanigo, dum kiu oni eĉ donacis insigneton pri Vimy, kiu por mi fariĝis tiom speciala... La monumento de Vimy estas tiom grava kaj plena je simbolismo por kanadanoj, ke ĝia bildo aperas sur la monbileto de dudek dolaroj kaj sur du (!) paĝoj de kanada pasporto ! Niaj kunvojaĝantoj kun scivolo rigardis niajn pasportojn, kaj mi fotis tiujn paĝojn de la bildoj de la pasporto apud la originalo. La monumento estas enorma kaj impresa : ĝia arkitekto dum du jaroj provis trovi ĝustan materialon laŭ koloro, teksturo kaj travideblo por sia majstroverko. Finfine, la ĝusta marmoro estis trovita en Kroatio, kaj la konstruado daŭris pli ol dek jarojn (nur la fundamento de la monumento pezas 11 mil tunojn). La monumento estis malfermita en 1936,



antaŭ 50 mil veteranoj. Ĝi havas du gigantajn kolonojn (kie estas gravuritaj la nomoj de pli ol 11 mil pereintaj kanadaj soldatoj) kaj dudekon da statuoj : la plej impresa estas la trista figuro de juna patrino, ploranta pri sia mortigita filo — ĝi simbolizas la junan nacion, Kanadon, kiu ene de tiom malgranda tempo perdis tiom grandan parton de siaj loĝantoj... (*vidu la bildon*) Tra la montetoj de Vimy daŭre kuras multaj tuneloj, tranĉeoj kaj krateroj, lasitaj de la eksplodoj de la Unua Mondmilito. Kelkajn tranĉeojn oni konservis por montri al la publiko. Ili estas ege mallarĝaj, kaj

mi ne povis ne miri, kiom proksime situis la tranĉeoj de la tiamaj malamikoj : kelkaj estas dividitaj de la distanco de nur kelkaj 15 metroj — tiom proksimaj, ke ili povis aŭskulti unu la aliajn paroli, aŭ terni... Mi povas nur imagi la paralizigan timon de ĉiuj, kiuj batalis, por kiu ajn flanko, esti eksplodigita en kiu ajn momento...



Nia lasta halto estis en la urbo Araso, kiu havis malbonŝancon esti nur kelkajn kilometrojn for de la frontlinio. Admirante la flandrajn barokajn vicdomojn, ni tute ne povis imagi, ke tie, sub niaj piedoj, kaŝiĝas alia urbo, la urbo subtera. La ŝtonoj por la belegaj konstruaĵoj de la urbo estis prenitaj... de sub la urbo mem : de la Mezepoko ĝis la 19-a jarcento oni uzis tiun ĉi ŝtonminejon por provizi la konstruŝtonojn por la urbo. Kiam komenciĝis la Unua Mondmilito, oni uzis kaj grandigis tiujn ĉi katakombojn por militaj celoj. Tiu ĉi ŝtonminejo nomiĝas

Ŝtonminejo Wellington honore al Nov-Zelando, ĉar 500 novzelandaj ministoj venis ĉi tien por konstrui tiun subteran urbon, kun 20 kilometroj da tuneloj, kuirejoj, necesejoj, fluanta akvo kaj



Arras supertere...

elektro. Irante tra la labirinto de la subterejoj ni vidas la skribaĵojn jen de la Unua Mondmilito, jen de la Dua, ĉar ankaŭ dum la Dua Mondmilito tiu loko estis uzata kiel kaŝejo. Diversaj partoj de tiu ĉi subtera urbo estas indikitaj per sagetoj, kaj ili portas la nomojn de diversaj urboj de la hejmlando de la ministoj, Nov-Zelando : Auckland, Wellington, Nelson, Blenheim... Foje ni vidas ankaŭ la nomojn de britaj urboj, ĉar la ŝtonminejo ja estis portempe loĝejo de soldatoj el Britio kaj el diversaj aliaj



... kaj subtere !

partoj de la tiama Brita Imperio. Sur la muroj ni vidas ankaŭ desegnaĵojn ; ni ne povis ne rideti vidante bildojn de bestoj, faritajn en la stilo de la desegnaĵoj de kavernaj homoj : la soldatoj, kiuj estis tie, certe havis bonan humursenton — ili eble pensis trompi nin, la posteulojn, aŭ, pli verŝajne, simple volis ridigi siajn amikojn. Eble ili eĉ provis imagi sin kiel kavernajn homojn, loĝante dum pluraj semajnoj sub la tero... Tiuj homoj loĝis

tie, subtere — en malvarmo, kun minimumaj vestaĵoj kaj kovriloj, en konstanta humideco kaj malvarmo. Mi ne povis ne admiri, kiom bravaj ili restis, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj : la fotoj kaj filmoj de tiu tempo montras, ke ĉiuj senescepte — la oficiroj kaj soldatoj — ĉiutage raziĝis, per glacia akvo, ili muzikis, verkis poezion, kaj kian poezion ! Kaj ili desegnis. Unu desegnaĵo plej

impresas min : ĝi estas portreto de juna virino kun eleganta ĉapelo. La portreto estas farita surmure per simpla kraĵono, sed ĝi transdonas tiom da emocioj, tiom da sopiro kaj tiom da amo... Mi volas kredi, ke la persono, kiu desegnis ĝin, revenis al sia amatino sekura kaj bonfarta... sed la

ŝancoj por tio estas sufiĉe malgrandaj... La batalo de Araso, por kiu oni prepariĝis fosante la tunelojn, estis planita kun la celo fini la Unuan Mondmiliton, sed unu neatendita evento — nome, subita movo de la okcidenta fronto — ŝanĝis la rezultojn. La batalo de Araso estis unu el la plej sangaj de la tuta milito : en unu tago de tiu ĉi batalo pereis 4 mil personoj... Tiuj ĉi tuneloj estis fermitaj post la la Dua Mondmilito kaj forgesitaj ĝis la 1990-aj jaroj. La muzeo malfermiĝis tie sufiĉe antaŭnelonge : nur en la finaj 2000-aj jaroj, por ke la memoro pri tiuj personoj ne forgesiĝu...

Dum ni revenis al la kongresejo la buso estis silenta. Mi pensis pri la militoj, kaj pri tio, kiom arde Zamenhof deziris pacon... pacon por ĉiuj homoj sur la tero...

Ĝis revido !

La ferma ceremonio estas ĉiam iom malĝoja, sed ĝi estas kiel fina akordo en bela muzikaĵo : sen ĝi la tuto ne sentiĝus kompleta. Kaj kia ferma ceremonio ĝi estis ! Mark Fettes omaĝis la ĝeneralan direktoron de UEA, Osmon Buller, kiu emeritiĝos venontjare (tio estis tre emocia momento por Osmo), kaj prezentis la novan



Kiom da emocioj povas transdoni simpla krajona desegnaĵo

direktorinon de la CO, Veronika-n Poór, ambaŭ kun aplaŭdoj kaj bondeziroj de ĉiuj ĉeestantoj. Mark ankaŭ menciis tre tristan eventon de tiu kongreso : dum la futbalmatĉo inter la teamo de esperantistoj kaj la teamo de la Okcidenta Saharo ambaŭ teamoj estis priŝtelitaj : iu eniris en la vestaŝanĝejon kaj prenis la monujojn kaj poŝtelefonojn de ĉiuj partoprenantoj, kaj por kelkaj personoj temis pri ilia tuta havaĵo. Tiu ĉi ĝoja amik-rivala evento fariĝis plena koŝmaro ne nur por la viktimoj de tiu ĉi krimo, sed ankaŭ por kongres-organizantoj, por Mark Fettes kaj lia familio, kiu devis resti por longaj interparoloj kun polico. La kongresanoj estis ŝokitaj de la okazaĵo, sed kio gravis, estis la reago de esperantistoj al la krimo : oni kolektis monon por repagi siajn perditaĵojn al ambaŭ teamoj, kaj la

LKK-anoj ankaŭ donacis sumon de plurcent eŭroj, je la aplaŭdo de ĉiuj ĉeestantoj. Ne gravas, kio okazas al ni, sed gravas, kiel ni reagas, ĉu ne ?

La plej kortuŝa momento de la ferma ceremonio venis de la invitantoj de la sekva UK : post la oficialecaj paroloj de la gravuloj el Slovakio, kaj kiam la atento de la aŭskultantoj eble iom forflugis pro tro longaj paroloj, Petro Baláž (la

estro de la sekva UK en Slovakio) petis la permeson iom deflankiĝi. Li komencis paroli unue pri la graveco de Esperanto en sia persona vivo, kaj ke dank' al Esperanto li konatiĝis kun sia koramikino, Dorota. Mi komencis eksuspekti, ke tio sonas kiel enkonduko al geedziĝpropono, kaj kiam li diris, ke li ŝatus pasigi sian vivon kun ŝi, mi ne plu havis dubojn, ke ĝi ja estos geedziĝpropono — kaj mia intuicio ne trompis min ! Ĝuste tie, dum la fermo de la centa UK, kaj invitante la UK-on al sia lando, Slovakio, kun pli ol 2000 atestantoj, Petro faris geedziĝproponon al Dorota. La respondo estis longa tenera kiso, sub la aplaŭdoj de pli ol du mil atestantoj, kiuj tiom neatendite fariĝis parto de la Esperanto-historio (nia prezidanto, Normando Fleury, ne povis reteni larmojn). Dumkongresaj geedziĝoj estas sufiĉe maloftaj, tamen ili ja okazis antaŭe, sed la publika geedziĝpropono dum la ferma ceremonio ? Tio ja estas unua fojo en la Esperanto-historio ! Por la sekva kongreso en Nitro ni ja atendas vidi plian belan E-geedziĝon ! ☺



La volontuloj kaj LKK-anoj

La ĉeforganizanto de la kongreso, Xavier Dewidehem, la LKK-estro, diris dum la kongresa fermo, ke homoj, kiuj translokiĝas al la nordo, ploras dufoje : la unuan fojon, kiam ili alvenas (nu, la vetero ne ĉiam agrablas, kaj ĉiuj, kiuj partoprenis la kongreson, atestos pri tio),

kaj la duan fojon, kiam ili foriras. Ni venis al Lillo por tre mallonga tempo, sed tamen tio estis sufiĉa por enamiĝi al tiu ĉi loko kaj revii iam reveni !

La 100-an Universalan Kongreson...

ĉeestis **2698** partoprenintoj

el **80** landoj

ĉ. kvarono de kongresanoj (**724**) estis el Francio

sur la dua loko estis Germanio (**200**)

el Kanado ĉeestis **26** esperantistoj

La virtuozo kaj la arbohakisto

Xiong Shan

Chronique de Radio Chine Internationale en espéranto, au sujet d'un grand musicien chinois de l'Antiquité qui s'était lié d'amitié avec un bûcheron. Ce dernier était le seul de ses contemporains qui, selon son ami musicien, comprenait vraiment son art.

En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno de la dinastio Zhou [~771– ~453 a.K.] en la regno Chu estis fama muzikisto nomata Yu Boya. Jam en sia infaneco Yu Boya estis ege saĝa kaj talenta kaj ŝatis muzikon. Li lernis ludadon de kord-instrumento de renoma majstro Cheng Lian.

Post 3-jara lernado Yu Boya mem fariĝis fama kord-instrumentisto. Sed li ĉiam ĉagreniĝis, pro tio, ke li ne povas atingi pli altan animstaton de la ludarto. Rimarkinte tion, lia instruisto Cheng Lian diris : « Mi jam instruis ĉion al vi kaj vi bone lernis. Mia instruisto Fang Zichun estas vera majstro en ludado de kord-instrumento kaj havas apartan senton pri muziko. Li loĝas en iu insulo sur la Orienta Maro. Ĉu mi konduku vin al li, por ke vi daŭre lernu la ludadon de li ? » Aŭdinte tion, Yu Boya ege ĝojis kaj tuj konsentis.

Ili preparis sufiĉan manĝaĵon kaj ekvojaĝis per

boato al la Orienta Maro. Iutage la boato atingis la monton Penglai ĉe la Orienta Maro. Cheng Lian diris al Yu Boya : « Atendu min ĉi tie, kaj mi iros venigi mian instruiston. Mi baldaŭ revenos. » Dirinte tion, Cheng Lian foriris kun la boato.

Multaj tagoj pasis, sed Cheng Lian ne revenis. Yu Boya ĉagreniĝis. Levinte la kapon, li rigardis la maron furioze ondegantan. Turninte la kapon, li vidis, ke la monteto kaj arbaro sur la insulo estas kvieta. Nur birdetoj kantis, iom melankolie. Yu Boya longe suspiris al la ĉielo kaj ekludis la kord-instrumenton. La melodio estis plena de melankolio. De tiam li pli kaj pli lertis en la ludarto. Fakte Cheng Lian ne havis instruiston loĝanta en iu insulo sur la Orienta Maro. Li nur volis, ke Yu Boya serĉu ian senton en la granda naturo.

Yu Boya vivis longe en la insulo kaj ĉiutage nur la

maro kaj birdetoj en la arbaro akompanis lin. Li tute ŝanĝiĝis kaj sentis la veran esencon de arto. Li komponis plurajn famajn melodiojn kaj fariĝis renoma ludisto de kord-instrumento. Tamen ne multaj homoj komprenis liajn melodiojn.

Iufoje Yu Boya vojaĝis laŭ la rivero. Kiam la boato proksimiĝis al alta monto, subite pluvis. La boato do haltis ĉe la monto.

Aŭdante la pluvadon kaj spektante la pejzaĝon, Yu Boya tuj sentis grandan emon por ludi la kord-instrumenton. Li sate ludis, kaj subite sentis neordinaran vibradon de la kordoj. Tio signifas, ke iu aŭskultas lian ludadon apude. Yu Boya do paŝis el la boato kaj vidis, ke iu arbohakisto, nomata Zhong Ziqi, sidas ĉe la arbaro.

Yu Boya invitis Zhong Ziqi al la boato kaj ambaŭ respektive sin prezentis. Yu Boya demandis : « Mi ludos melodion por vi, ĉu bone ? » Zhong Ziqi kompreneble akceptis.

Yu Boya senĝene ludis melodion titolitan Alta Monto. Zhong Ziqi aplaŭdis : « Kiom grandioza

monto ! » Yu Boya ludis alian melodion titolitan Fluanta Akvo. Zhong Ziqi laŭdis : « Kiom torenta rivero ! » Yu Boya admiris kaj emociiĝis, dirante : « En tiu ĉi mondo nur vi komprenas mian muzikon ! » La du novaj amikoj ĵure interfratiĝis.

Yu Boya interkonsentis kun Zhong Ziqi, ke post ĉi-foja vojaĝo li revenos al la hejmo de Zhong Ziqi por lin viziti.



Yu Boya revenis kaj vizitis la hejmon de Zhong Ziqi. Tamen ĉi-lastaj jam forpasis pro malsano. Aŭdinte tion, Yu Boya ege malĝojis kaj kuris al la tombo de Zhong Ziqi. Li ludis por sia bona amiko melodion plenan de rememoro kaj melankolio. Fininte sian ludadon, li

stariĝis kaj rompis la valoregan kord-instrumenton antaŭ la tombo de Zhong Ziqi. De tiam Yu Boya neniam ludis kord-instrumenton.

* rubriko « Socia vivo », Ĉina Radio Internacia, 2014-09-19. Reproduktita kun permeso de ĈRI.



Literature
La Idoj de la Suno

Dennis Drown

Ĉapitroj 5-6

(legu la komencon en *La Riverego* 114 : esperanto.qc.ca/eo/riverego)

Ĉapitro 5

Por kompreni amon

Rigardu la Sunon

Kolore karesante vian Teron,

Plezure lumigante vian vivon,

Li nutras vin

Li amas vin

Kun flamo en via kor'

Karesu,

Lumigu.

Estu li.

Amu, kiel amas la Sun'

- prapatroj de la Taŭakla

Ĝarelo provis reendormiĝi, provis malatenti la vekigan voĉon de sia patrino. Li gardis siajn okulojn fermitaj. La sonĝo ekpaliĝis nun, kaj li ne volis lasi ĝin forgliti. Li malrapide kaj dormeme karesis sian bruston, imagante ŝian manon tie, dum li provis daŭre teni la sonĝon, rebildigi ŝian vizaĝon en sia kapo.

« Mi scias nun, » li murmuris dormeme. « Uŝ, kian donacon vi donis al via knabo. Nun mi komprenas. Kiso. La kialo estas Barbara. »

Ĝarelo streĉis sian korpon sur la mato. La teksita pajlo frotis kontraŭ lia haŭto. La sento rememorigis lin pri la tuŝo de Barbara, kiam ili kisis. Li imagis ŝin apud li, karesante lian dorson per unu mano, leĝere tuŝante lian bruston per la alia. Li ĝemetis mallaŭte. Li volis, ke ŝi estu ĉi tie, kuŝanta kun li. Li volis kisi ŝin denove, se li povus nur floseti reen en sian sonĝon. Tie ŝi staris, ĉe la

pordo de la dorma mondo. Ŝi atendis lin. Li devis iri al ŝi.

« Filo, vekigu. Aĥiĉalo promenas jam, kaj via kampo atendas vin. »

« Mi scias, » ĝemis Ĝarelo. « Mi venas. »

« Ho, mi devas memori tiun ĉi songon, » li flustris al si. Sed neniam li rememoris siajn songojn, kaj nun ke li ekpensis pri la kampo kaj pri sia laboro tie, la detaloj de tiu ĉi jam estis ekperdiĝantaj en la taga sunlumo.

Ĉapitro 6

Amataj, ni amu unu la alian ; ĉar la amo estas el Dio ; kaj ĉiu, kiu amas, naskiĝas el Dio kaj Dion konas.

- De Johano 1, Ĉapitro 4

Dum Ĝarelo survojis al sia laboro tiun matenon, irante por gvati la maizkampon, Imigko staris en maldensejo ne malproksime de tie. Li konturumis malrapide per sia lango la lastan el siaj antaŭaj dentoj. Tion li ĉiam faris dum li serĉis plej taŭgajn vortojn por esprimi ion gravan. Estis kvazaŭ ĉio de lia saĝeco decidis rifuĝi en tiu lasta tranĉdento,

post kiam la vivo prenis la aliajn de li, unu post unu. La vivo kurbigis lian spinon, kaj kreis maljunulon el lia korpo, sed ĝi provizis lin per saĝeco. Nun, se li nur sufiĉe longtempe karesus la denton, ĝi metus la bezonatajn vortojn en lian kapon.

« Kial la idoj de la Suno volus malhonorii niajn prapatrojn kaj niajn gediojn ? Ĉu la Tero ne donas al ni ĉion, kion ni bezonas por vivi kaj feliĉi ? Ni estas benataj. Kion alian vi volus ? Kion havas ĉi tiuj fremduloj, kion ni bezonas ? Kion proponas al ni iliaj gedioj ? Mi diras al vi, ke ni jam havas ĉion, kaj mi diros al vi denove, idoj de Aĥiĉalo, ni estas benataj. Ni gajnos nenion per ricevi ilin, la *tuvfaek*. Mi ja timas tamen, ke ni perdos multe. Ni finfine perdos nin mem. »

La vortoj estis venintaj, kaj nun Imigko rigardis la aliajn sidantajn en la sankta cirklo. La cirklo ne estis preparita por ceremonio, sed Imigko esperis, ke la sankta loko transdonus senton al Keĉago kaj la aliaj du, kiuj ĉeestis, de la eco de la Taŭakla popolo. Sef, la filo de Keĉago, jam pruvis sin je la plenkreskulaj rajtoj la antaŭan sezonon, kaj li estis veninta kun sia patro. Li estis alta knabo, maldika, kaj li antaŭĝojis la ideon havi ĝvidantan rolon por servi sian tribon. Li sentis sin preta. Ankaŭ Sef havis profundan amon por sia popolo, kiel ĉiam

evidentis en lia patro. Keĉago indikis iufoje tamen, ke la amo en la koro de Sef ankoraŭ bezonis maturecon kaj saĝecon por gvidi ĝin. Ĉi tiu mensbildo, kiun havis lia patro, fojfoje ĝenetis Sefon. Ekde la infanaĝo Sef ĉiam senĉese atentis Imigkon. Li konis la instruajn vortojn de la prapatroj. Li respektis la gediojn. Laŭ li, li komprenis sian popolon. Kaj li amis ilin.

Ankaŭ Ĉemo estis veninta al la cirklo. Li ĉiam venis, kiam Keĉago volas diskuti pri la tradicioj kaj bonfarto de la tribo.

Imigko etendis sian spiriton. Li provis senti tion, kio troviĝis en la koroj de la viroj, kiuj venis tiun matenon. Gravis, ke ili komprenu. Gravis por la tribo. Li montris demandeman mienon kaj tiam sendentan rideton al Eta Anja, kiu sidis ĉe la rando de la cirklo, kie ŝi eltiris mildan ritmon el malgranda tamburo. Imigko enspiris la aromon de la montetoj. Li povis senti siajn prapatrojn tie kun ili. Li sentis ankaŭ ŝiron, kiu disvolviĝas en la volo de la tribo. Imigko estis ilia spiriteca gvidanto, sed Keĉago, la triba ĉefo, vidis alian vojon por sia popolo.

Keĉago stariĝis. Estis pieco en liaj okuloj, kaj zorgo. « Sankta spiritulo, vi plej bone konas niajn morojn kaj la lecionojn de niaj prapatroj. Pere de vi la gedioj sendas al ni siajn vortojn, kaj vi gvidas nin,

por ke ni komprenu iliajn dezirojn. Vi konas nian historion, kaj vi instruas ĝin al ni. Vi donas libere el via saĝeco, por ke ni vivu plene en la nuno kaj kreu fruktoplenan estontecon por niaj idoj.

« Mi respondecas pri tiu estonteco. Vi aŭskultas niajn prapatrojn. Samtempe mi aŭskultas niajn tribanojn. » Li rigardis sian filon, kiu sidis apude, aŭskultante lin plenatente. Li metis sian manon sur la kapon de la junulo kaj daŭrigis serioze. « Ni ne intencas flankenmeti niajn morojn, Imigko, sed multaj el ni volas koni ĉi tiun mondon, la pli grandan mondon, en kiu ni vivas. Ni estas parto de tiu mondo. Jam dum jaroj, fremduloj venas al ĉi tiu montetaro por viziti nin. Malofte ili venas, sed sufiĉe, por ke la Taŭaklanoj volu scii pli pri ili. Ni scivolemas pri ilia mondo. »

La kurbigita korpo de la saĝulo ŝanceliĝis, dum li argumentis, « Vi jam iris kun la *tuvfaek*, tri-foje nun, » respondis Imigko. « Ĉu vere estas tiom alloga ilia mondo ? Vi revenas kun pecetoj de ilia kulturo, kun iliaj vestoj, kun strangaj ludiloj, kiujn vi disdonas al niaj geinfanoj. Kian magion havas ĉi tiuj aĵoj ? Kion vi volas de ĉi tiuj *tuvfaek* kaj de iliaj gedioj ? Kio mankas al la Taŭakla, kaj kio pelas vin pensi, ke vi devas serĉi ĝin ekstere de nia tribo ? »

Tiam parolis Sef. Liaj okuloj brilis pro interesiĝo kaj intenco. « Imigko, ĉu Aĥiĉalo diris al vi ? Ĉu la

gedioj diris al vi, ke ni ne permesu, ke la *tuvfaek* vivu inter ni, ke ni kontraŭu, ke ili parolu al ni pri iliaj gedioj, la Kristanoj ? » Li scivolis, ĉu oni ne jam priparolis tiun demandon. Ŝajnis al li tre simple. Imigko parolas pri tio, malhonoru la gediojn. Kion diras la gedioj ?

« Sef, vi nun estas plenkreskulo. Vi jam atingis la aĝon kaj plenumis la rajtojn. Nun vi eksidas ĉe via patro kaj komencas pensi kaj decidi pri la bono de la tribo. Sed por bone decidi, nepras, ke vi provu kompreni ion pri la gedioj ; pri tio, kiaj ili estas ; kaj pri tio, kiel ili rilatas kaj parolas al siaj idoj sur la Tero. Mi ne povas demandi al Aĥiĉalo, ĉu li volas, ke venu la *tuvfaek*. Li ne respondus al mi. Ne tiel mi scios la volon de la Suno kaj la Luno. Ilian volon tamen mi vidas en sonĝoj. Mi sonĝas, dum mi dormas, kaj mi sonĝas en vekiteco. Dum mi sonĝas, ili prenas min. Ili montras al mi nian estontecon. »

« Kaj kion vi vidas ? » demandis Ĉemo urĝe. « Diru al li. Parolu al Sef kaj Keĉago pri tio, kion vi diris al mi. » Trankvilaj okuloj de Imigko rigardis Ĉemon, kaj la saĝulo demandis sin dum momento de kie venis tiu avido en Ĉemo.

Imigko daŭrigis. « Plurfoje mi havis viziojn. Mi vidas nian popolon en neniejo inter du mondoj. Unu mano tuŝas ilian modernan mondon. Tiu

mondo allogas nin, sorĉas nin. Ni deziras ĝin, sed ni ne povas esti parto de tiu mondo. Ni ne apartenas al ĝi. Neniĉ ni apartenos al ĝi, ĉar ni ne taŭgas por ĝi. Tamen ju pli ni maltaŭgas, des pli ni sopiras al ĝi. Ni deziras ĝin tiom forte, ke iom post iom ni forgesas pri nia alia mano. Tiu mano ankoraŭ tuŝas la mondon de niaj prapatroj, sed nia teno iom post iom malfortiĝas, kaj eventuale ni perdos nian mondon. Ni eĉ ne scios, ke ni perdis ĝin, ĉar ni estos forgesintaj. Niaj gedioj krios dolorplene, sed ni ne aŭdos ilin. Ni ne plu aŭskultos. De la ombroj niaj prapatroj rigardos ĉion ĉi okazi, sed ni ne plu vidos ilin.

« Sef, la gedioj donas al ni vivon. Vi scias tion, sed ankaŭ ni, iliaj idoj, redonas vivon al ili. Ni estas parto de la gedioj. Vi, mi, ĉiuj ni, ni estas la gedioj enkarniĝintaj. Pro tio ili estas sanktaj. Ni nepre ne malhonoru ilin. Ni ne malhonoru nin mem. » Imigko sentis sin laca subite. Li paŝis en la centron de la cirklo kaj sidiĝis.

« Vi scias, » diris Ĉemo, « ke antaŭ longa tempo, la Taŭakla estis grandega kaj glora. Nia popolo estis grandioza, kaj ni estis ĉie. Ni havis templojn kaj piramidojn, kiuj tuŝis la ĉielon, por honoru la Sunon kaj la Lunon. La idoj de Aĥiĉalo de tiu epoko konis la vivon. Ili konis la Teron, kiu donis vivon al ili. Ili konis sian ligon al la gedioj.

« Sed kio okazis ? Niaj reĝoj estas mortaj nun. Niaj piramidoj ruiniĝintaj. Kio sorĉis niajn praajn geavojn, por ke ili lasu sian sanktan mondon disfali ĉirkaŭ ili ? Ili tute malaperis, kaj nur kelkaj tribetoj postrestas nun. Ni estas unu inter ili. »

« Kaj vi pensas, ke eble ili ne atentis la vortojn de sia saĝulo, » demandis Sef, kaj zorgo sulketigis lian frunton.

Keĉago reprenis la parolon. « Ni ne volas malhonoru niajn gediojn. Ni ne volas malatenti niajn prapatrojn. Tamen ni ne povas ĉiam vivi en la hieraŭo. Ekzistas pli granda mondo, kaj estas ĝi, kiu venis al ni. Ni ne serĉis ĝin. Ĝi venis al nia montetaro, salutis nin, kaj sugestis, ke ni lernu unu pri la alia. Kaj nun, jes, ni interesiĝas pri tiu mondo. Aparte niaj gejunuloj volas koni ĝin.

« Metante sian manon sur la ŝultron de Ĉemo, Keĉago daŭrigis sincere kaj optimisme, « Mi ne intencas antaŭeniri sen aŭskulti la vortojn de nia saĝulo. Se venos ŝanĝoj, mi devos zorgeme konsideri tion, kion li diras. Mi zorgeme atentis lin nun. Ĉu vi pensas, ke mi volus, ke ni perdu la econ de nia tribo, ke ni troviĝu en tiu neniejo, pri kiu parolis Imigko ? Ne. Kompreneble ne. Ĉi tiu Sinjoro Whitley venis kun sia familio por paroli al ni pri sia mondo. Mi jam scias iom pri tiu mondo, kaj mi povas diri al vi, ke ĝi inkluzivas multajn popolojn,

kaj ĉiu diferencas de ĉiuj aliaj. Mi ne povas kredi, ke ne ekzistas vojo al ia interkompreno, kiu ne forgesigos nin pri ni mem. Ni estas la Taŭakla, kaj la Taŭakla honoras siajn prapatrojn. Ni estas la idoj de la Suno, kaj ni honoras niajn gediojn. Tio ne ŝanĝiĝos. Ni ja povas tuŝi la estontecon, kaj ni ne forgesos. Ni scias, kiu ni estas. Ni ĉiam scios. »

Ĉemo volis diri ion plian, sed per rapida, serioza rigardo, Imigko indikis al li, ke li restu silenta. Ĉio jam estis dirita por nun. Tiam Imigko stariĝis. Li ridetis al la aliaj, kaj levis ambaŭ manojn supren, por ke ankaŭ ili stariĝu. Li brakumis unue Keĉagon kaj poste Sefon kaj Ĉemon. Li tenis ĉiun firme dum longa momento, milde elpelante frustron kaj ĉagrenon, vokante al amo kaj paco por veni anstataŭi ilin.

Tiam li prenis saketon de maizgrajnoj de ĉe sia zono. Ĉantante dankojn al la Tero kaj la ĉielo, li malrapide piediris dekstrume du-foje laŭ la rando de la cirklo. La tri tribanoj ĉantis kun li. Eta Anja batis sian tamburon. Kiam li laŭiris la trian fojon, li haltis ĉe la nordo de la cirklo. Tie li genuiĝis kaj riverencis al la Gvatspinitoj de la Nordo. Li dankis al ili solene, lasante manplenon da maizo. Tiam li stariĝis kaj daŭrigis por malfermi la cirklon en la Oriento, Sudo, kaj Okcidento, simile honorante ilin.

Stefano ne povis aŭdi la ĉantojn. Kiam li venis al la tribo la unuan fojon, li petis, ke lia preĝejo konstruiĝu proksime de ilia religia ritejo. Keĉago ne komfortis pri la ideo, kaj Stefano decidis, ke ne indis esti puŝema, aparte je la komenco, kiam iliaj du kulturoj nur estis ekkonantaj, unu la alian.

Eble bonis tamen, ke Stefano ne povis aŭdi la ĉantojn de Imigko kaj la aliaj de ilia sankta cirklo. Hodiaŭ tio tutcerte malkomfortigus lin. Ĉio estis bone antaŭeniranta. La traduko de la evangelioj pruviĝis malfacila tasko, sed farebla. Ĉiun matenon, kun siaj notoj ĉe-mane, li kvazaŭ perforte sidigis sin ĉe sia skribotablo por traduki iom pli. Li malamis la laboron. Li eble eĉ dirus, ke li abomenas ĝin, sed li preferis eviti tiun vorton.

Ĉio facile forprenis sian atenton. Li ekpensus pri la ĝusta vorto por io, kaj konstatus post tridek minutoj, ke lia menso estis forvaganta al problemoj kun lia familio, al manko de bona komuniksystemo kun la eklezio, al io ajn krom la traduko de la evangelio. Ĉiun nokton tamen, malgraŭ sia malverkemo, li povis kontentigi sin per trafolumo de pluraj paĝoj de finita laboro.

Jes, ĉio estis iranta antaŭen, kaj pli-malpli laŭplane, sed ial li sentis sin iom malgaja, kaj li ne sciis kial. Nun li promenis ĉe la preĝeja konstruejo, serĉante inspiron, sed la malfeliĉa sento sekvis lin.

Ĝi mordetis al li.

Ĉio ŝajnis en ordo. Estis problemoj kaj malfacilaĵoj kompreneble, sed jam de antaŭe dum la preparado por la misio, li sciis, ke estus tiel, kaj en sia koro li sciis, ke ili ne estis la kialo de lia malgajo.

La loko por la preĝejo troviĝis proksime, sed ankoraŭ iom aparte, de la plej granda ĥataro. Krom la truo por la puto kaj la amasetoj de tero ietie, kiujn oni elfosis el ĝi, la loko aspektis same kiel la cetero de la dezerto : malhelruĝa sablo, kakto, kaj grandega kvanto da nenio. Inspiro ne venis al Stefano, dum li rigardis la malplenan spacon, nur penso, ke li ĉi-momente ekkomprenis iom de la frustrego de sia filino pri tiu ĉi loko.

Li iris al la puto. La truo mezuris je metro kaj duono. Stefano rimarkis, ke jam la laboristoj metis ŝtonojn ĉirkaŭ ĝian randon. Sur tiuj estis argila poto, plena je akvo, kiun iu estis forlasinta. Tiam li rigardis malsupren en la put-truon. Li ne povis vidi la fundon. Du metrojn sube, li vidis lignan stangon, kiu funkciis kiel kruĉapogilo. Iom pli sube estis alia, sed en la mallumo, li apenaŭ povis vidi ĝin.

« *Tanala maa*, » vokis voĉo el la truo.

Stefano retrosaltis pro surprizo. Lia koro bategis, kaj li devis atendi momenton por rekapti sian spiron. « Ah, *tanala ma*. Ĉu akvo jam ? Mi ne sciis,

ke iu enestis. »

« Ankoraŭ ne, Sinjoro, sed baldaŭ. Ne zorgu. Ni ne devos fosi multe pli profunden, » diris la viro. Stefano nun povis ekvidi lin, dum li grimpis supren.

Kiam la viro fine atingis la supron kaj eltiris sin el la puto, Stefano pensis dum momento, ke li aspektis kiel demono, venante supren el infero. Li estis kovrita per ŝvito kaj ruĝa tero, kaj la du miksiĝis ĉie sur lia korpo kaj en lia hararo por krei tion, kio ŝajnis al Stefano la vera eco de malpureco.

« Tre baldaŭ vi havos akvon por konstrui vian preĝejon, Sinjoro, » diris la demono, ridetante dum li fingrimpis el la fosaĵo, kiun li estis kreinta en la tero. Li prenis la argilan poton, trinkis iom de la akvo, kaj tiam lavetis siajn manojn kaj vizaĝon.

Silente Stefano pensis, ĉu tio helpis iel ajn ? dum li fikse rigardis la viron. Nun li havas homan vizaĝon sur korpo de demono. Ne, ne ! Li aspektas kiel io misa, kion sendis Satano por forpeli min de tiu ĉi malbenita loko.

Tiam Stefano malridetis pro tio, kio estis okazanta en lia kapo. Mia Sinjoro ! Kiel mi povus pensi tiel ? Tiu ĉi ja estas homo, unu el tiuj, por kiuj vi estas veninta, kaj li eĉ laboras pri via preĝejo.

« Dankon, » diris Stefano, provante doni al la viro

bonkoran rideton. « Tio estas malfacila laboro, ĉu ? »

« Ne tiom, Sinjoro. Fosi putojn estas mia laboro. Ĝi plaĉas al mi. Mi estas kun la tera patrino, kaj pere de miaj manoj, ŝi donas sian kaŝitan trezoron al ni. »

« Kia bonega pensmaniero ! Vi faras la laboron de Dio, ĉu ne ? » Mi scivolas, Stefano pensis al si, kion li diros pri tio. Tiam li haltis kaj rekonsideris, ĉu indas antaŭeniri tiel ĉi ? Ĉu vere mi volas krei ligan inter iliaj idolaj gedioj kaj la unu vera Dio ? Eble tio estas la plej facila vojo, sed mi dubas, ke ĝi estus la plej bona. Kial indus rapida konvertiĝo, se ili havos falsan komprenon de Dio ?

Stefano serĉis ian reagon al sia komento sur la vizaĝo de la viro. Li trovis neniun. Kompreneble, ajna reago povus facile kaŝi sin sub tiu tavolo de polvo, Stefano pensis. Li mordetis sian langon. Mi ne devas pensi tiel, li rememorigis sin, kaj li igis sin rigardi la malpuran viron kiel homon, kiel la idon de Dio, kiu li estis. « Ĉu vi fosis ĉion ĉi per vi mem ? »

« Ne, Sinjoro. Por putoj profunda, necesas du viroj. Ĉeĉam laboras kun mi. Li ĵus hejmeniris por tagmanĝo kaj posttagmeza siesto. Estas iom frue por hejmeniro ĝuste nun, sed lia edzino bezonas

lian helpon. Ilia filo malsanas. Sed Ĉeĉam revenos poste en la frua vespero. »

« Lia filo malsanas ? Mi esperas, ke estas nenio grava. »

« Mi ne vere scias. Mi pensas, ke ne. Ĉamogko, la filo de Ĉeĉam, estas la tria infano, kiu malsaniĝis. Jam antaŭe estis knabino kaj alia knabo. Ili estis treege malsanaj dum tri aŭ kvar tagoj. Ili havis severan febron, kaj ili tiom lakis, ke preskaŭ la tutan tagon ili povis nur dormi. Poste ĝi pasis, kaj ili rapide resaniĝis.

Ĉamogko espereble faros same, kaj tre baldaŭ. Li estas bona knabo. »

« Mi esperas, ke jes. » Tiam Stefano paŭzis. Ial estis malfacile por li paroli al la homoj ĉi tie. Li sentis, ke li devis bonvenigi ĉiun oportunon, ĉar li havis gloran mesaĝon por ili. Foje tamen la mesaĝo ŝajnis tiom granda, kvazaŭ ĝi estus tro por ili, io nekomprebla. Li volis paroli al tiu ĉi viro pri Dio, sed li ne sciis, kiel komenci. Malhelpis tio, ke li devas paroli en la taŭakla. Stefano studis la lingvon jam dum preskaŭ du jaroj. Li pensis, ke li sufiĉe bone regis ĝin. Li povis bone komuniki, sed ŝajnis ankoraŭ, ke li ne havas la lingvopovon, kiun li havas kun sia gepatra, la angla. Foje tro malfacilis esprimi gravajn nuancojn, kiuj vere endis por

prezenti klaran kaj integran bildon de Dio. Li sentis sin timema, parolante eĉ pri teologio—fako, kiun li prufunde konis, aparte parolante pri teologio.

« Pardonon. Kio estas via nomo, kaj ĉu ankaŭ vi havas geinfanojn ? »

« Mi ne havas infanojn, nek edzinon. Kelkaj taksas tion stranga, sed mi ne havas. Isiku mi nomiĝas. »

« Kaj mia nomo estas Stefano Whitley, sed kutime... vi povas nomas min Patro Stefano. »

Ĝis tiu ĉi momento Stefano ne certis pri tio, ĉu li uzu la titolon Patro, aŭ ne. Li certe ne estis katolika, sed li ĉiam opiniis, ke tio, uzi familiajn titolojn, estis unu el la tradicioj, kiujn la Protestantaj eklezioj devus ekde la komenco adopti de la patrino Katolikismo. Krome, familiaj ligoj inter la Taŭakla estis ekstreme fortaj. Stefano sciis, ke infanoj ofte nomas oklinojn patrino kaj onklojn patro por montri respekton, se tiuj familianoj aktive helpas eduki ilin.

Stefano neglektis mencii al la eklezio, ke li eble uzus la titolon Patro en la taŭakla lingvo. Li scivolis, ĉu unu aŭ la alia el la du vojaĝantaj komitatanoj rimarkos tion, kiam ili venos post kelkaj monatoj por kontroli pri lia progreso. Kiel ili konstatos ? Stefano demandis sin, ili ne scipovas la taŭaklan.

« Kial patro ? » Isiku demandis al li. « Ĉar vi havas la du infanojn ? »

« Ne, Isiku. Oni ofte nomas viron Patro, kiam tiu dediĉas sian vivon al Dio la Eternulo kaj al instruado de Dio al aliaj homoj. »

Espriminte tiujn vortojn, Stefano eksentis sin pli trankvila pri tio, paroli kun la viro. Li demandis, « Kion diras personoj pri tio, ke ni alvenis ĉi tien ? Ĉu vi scias, kial mi venis vivi inter vi ? »

Isiku pensis dum momento. « Keĉago diras, ke vi volas, ke ni konu viajn gediojn. Li diris, ke vi volas konstrui domon, preĝejon, kaj viaj gedioj venos por vivi en ĝi. Li diras, ke ni helpos vin konstrui ĝin. Tial mi fosas tiun ĉi puton. Kiu estas ĉi tiu Eternulo ? Ĉu li estas la reĝo de viaj gedioj ? Ĉu li venos unue, kiam ni finkonstruos la didomon ? »

Interesaj antaŭvidoj, pensis Stefano. Kie mi komencu ? « Isiku, estas nur unu Dio. Li estas la Sinjoro, la Eternulo, kaj jes, mi volas, ke vi konu Lin. »

« Nur unu dio ? »

« Nur unu. Unu Dio. Li estas nia Patro. Ni estas Liaj idoj. »

« Sed kio pri via Suno ? Via Luno ? Kiu nutras vin ? Kiu donas al vi pluvon aŭ provizas vin dum ĉaso ? »

« Dio faras ĉion ĉi. »

« Ŝajnas tro multe por nur unu dio. Li devas esti tre ŝarĝita. »

Stefano ridetis. Jen taŭga vojo, li pensis. Frapu, kaj la pordo estos malfermita por vi. « Dio estas ĉiopova. Li provizas nin per niaj tagoj kaj niaj noktoj kaj per ĉio, kion ni bezonas por plenigi ilin. Ĉio, kion ni havas, Li donis al ni, kaj ni estu dankemaj pro tio. Li estas nia Sinjoro, nia Patro. »

La taŭaklano ne aspektis konvinkita. « Tro ŝarĝita li estus laŭ mi. *Ok' aĉi Uŝ !* Kaj amo ? Kiu tiklas viajn korojn ? Kiu estigas en vi deziron ? Kiu gvidas vin en viaj vivoj ? Kiu faras ĉiujn tiajn aferojn por vi ? » Li viŝis sian frunton per la malantaŭo de sia mano. Tio ĉi lasis ruĝ-brunan makulon sur lia vizaĝo.

« Dio, kompreneble. Dio estas amo, Isiku. » Tiam la pensaĉo ŝtele englitis en lian menson denove, kaj li malridetis. Li ne povas teni sian homan formon. Ho, ĉu mi estas parolanta al la homdemono pri amo ?

Stefano enspiris malrapide. Sinjoro, Vi ne estas sen humuro, ĉu ne ? Sed kion mi faras ? Se mi daŭre pensas tiel ĉi, mi neniam povos tuŝi lin. Kial mi ne povas vidi lin kun la amo, kion mi predikas ? Stefano grimacis kaj komencis silentan konsiladon al si mem. Koncentriĝu nun. Memoru, ke tiuj ĉi

homoj tute samas, kiel vi kaj via familio. Ili ne estas sovaĝuloj. Ne vidu ilin strangaj. Ili estas idoj de Dio, samkiel ni. Barbara malamas ilin. Maria taksas ilin tro strange fremdaj. Kaj vi ? Stefano, vi estas tie ĉi por misio de Dio. Vi parolas pri amo. Ĉu vi amas tiujn ĉi homojn ? Vi devas ami ilin, aŭ viaj propraj antaŭjuĝoj mortigos ĉion, kion vi intencas fari ĉi tie. Aŭskultu viajn proprajn vortojn. « Dio estas amo. »

« Mi ne komprenas, » Isiku diris al li. « Via dio estas amo. Li estas la Luno kaj la pluvo. Li lumigas la Teron, kaj li nutras vin. Vi diras, ke li estas ĉiopova, sed mi ne vidas, kiel li povus fari ĉion ĉi. Li neniam havus tempon por ripozi. Li neniam povus doni sian ŝarĝon al alia dio, aŭ al alia diino, ĉar vi ne havas diinon. Se estas nur unu dio, de kie venas ineco en via mondo ? Virdio ne povus krei inecon, eĉ se li estus ĉiopova. Vi diras, ke li estas via patro. Kiu do estas via patrino ? »

Li ne helpas min forigi la penson, ke li estas demono, pensis Stefano amarete, sed mi jam parolis kun la eklezio pri tio ĉi, antaŭ ol ni foriris. Ili diris, ke mi devos atendi, ke ili ne tiom facile komprenos. Ili diris, ke estos facile frustriĝi. Ĉio ĉi tie estas fremda al mi, kaj ĉio, pri kio mi parolas, estas fremda al ili. Mi devas trovi ponton. Li entenis sian spiron momente, por trankviligi sin. Li

ellasis la spiron.

« Isiku, vi lernos, ke Dio ja estas mistera. Ofte Liaj rimedoj estas ekster nia kompreno. Li estas glora kaj mirakla. Mi esperas, ke ni ofte povos paroli pri Li, en la preĝejo kaj ankaŭ babilante malformale kiel nun. Mi esperas, ke vi volos koni Lin. Mi instruos al vi, kiel paroli al Li per preĝado, kaj ni povos diskuti pri la manieroj, per kiuj Li eble respondos al vi. Kun tempo, mi pensas, vi ricevos respondojn al ĉiuj viaj demandoj. »

« Jes, ja plaĉus al mi lerni pli. Via dio ŝajnas interesa. Mi scivolas ankaŭ pri tio, kia estos lia preĝejo. Plaĉus al mi vidi ĝin, kiam ĝi estos fine konstruita. Tiam li venos por esti kun ni, ĉu ne ? »

« Li jam estas ĉi tie, Isiku. »

« Kie estas la infanoj ? » demandis Stefano, vidinte ke ĉeestis Maria sole. Ŝi sidis en angulo, legante libron. Aspektas, li diris al si mem, ke ŝi volas kaŝi sin. Ŝi legas sian romanon, alian el siaj romantikaj rakontoj tutcerte. Ŝi povus legi la evangelion, la parton, kiun mi jam tradukis. Ŝi povus kompari la taŭaklan version kun la angla, inda legado kaj bonega lingva praktikado. Se ŝi pli lertus pri ilia lingvo, ŝi povus eĉ helpi min redakti ĝin.

Ŝajnis al Stefano, ke ilia eta domo, tiu domo, kiu laŭ Maria estos apenaŭ ĝuste sufiĉa, nun iĝis ŝia kaŝejo.

Maria nun vidis ĝin, kiel ŝian fuorton.

« Samkiel oftaj tagoj nun, kara, » Maria respondis al lia demando. « Barbara iris por promeni en la montetaro, kaj Roĉjo estas kun tiuj virinoj, lia alia familio. » Ŝi ridetis. « Kiel ili nomiĝas ankoraŭ foje ? La fratinoj Telocú ? Mi havas terurajn problemojn kun tiuj Taŭaklaj nomoj. »

Ŝi vidis malaprobon sur lia vizaĝo. « Stefano, ili ambaŭ jam helpis min purigi la domon, kaj mi diris, ke ili rajtas iri. Kial vi volas enŝlosi ilin ĉi tie ? Ne estas nature. Ili estas infanoj. Ili bezonas ludi, esti en la suno, esti infanoj, ĉu ne ? »

« Mi neniam diris, ke mi volis enŝlosi ilin en la domo, sed ili ne devas ĉiam esti for. Ni estas familio, kaj tiu ĉi familio nuntempe troviĝas en tute nova kaj iom malfacila viva sperto. Ni estu ĉi tie por apogi kaj helpi unu la alian. Ili ne devas forkuri el la domo je ĉiu oportuneto. Ili ne devas lasi vin sola. »

« Fakte plaĉas al mi havi mian tempon por esti sola. Tiuj ĉi tempoj helpas min kutimiĝi al ĉi tiu, kiel vi diris, nova kaj malfacila viva sperto. »

« Ĝuste pri tio mi estis pensanta lastatempe. Mi opinias, ke eble estas vi, kiu bezonas la sunon kaj iom pli da kontakto kun tiuj ĉi homoj. La infanoj bezonas pli da familia tempo ĉi tie. Indus, ĉu ne ? ke vi provu ekkoni la tribanojn kaj plibonigi vian lingvopovon. Ni pasigos du jarojn ĉi tie. Post tiuj du jaroj, ĉu vi volas, ke via nura memoraĵo estu la interno de tiu ĉi domo ? »

Tio kolerigis Marian. Ŝi stariĝis. « Stefano, aŭskultu min. Vi volas, ke ili estu ĉi tie en la domo. Vi volas, ke mi estu el la domo por pasigi tempon kun la Taŭakla kaj lerni ilian lingvon. Tion vi volas, ĉu ? Ĉu vi scias, dum kiom da tempo ni jam estas ĉi tie ? Dum du semajnoj nur. Vi pravas. Tio ĉi estas nekredeble malfacila situacio por mi kaj por viaj gefiloj. Vi havas neniun ideon, kiom malfacila ! Tiu ĉi misio estas via afero. Ni ne venis ĉi tien pro nia propra volo. Ni venis por apogi vin. Ni estas ĉi tie por vi. Ĉu vi ne povas vidi tion ? Nun vi devas lasi nin kutimiĝi al tiu ĉi nova vivo laŭ niaj propraj rimedoj. Se vi ne permesos tion, iu freneziĝos ! Jes, ja ! Iu freneziĝos, kaj tiu povus facile esti mi.

Maria ĵete svingis siajn manojn en la aeron. « Ĉu vi ne rimarkis, kiom multe Barbara pli kontentas nun, ol kiam ni alvenis ? Dio mia, Stefano, ŝi estas multegege pli kontenta ! Ŝi promenas en la montetaro, kaj kiam ŝi revenas, ŝi aspektas feliĉa.

Ĉu vi komprenas ? Ŝi abomenis tiun ĉi lokon. Sed nun mi vidas feliĉon sur la vizaĝo de mia filino. Se promeneto en la montetoj donas tion al ŝi, ŝi promenu. Vi diros nenion !

« Kaj rigardu momente vian filon. » Maria fingroindikis el la fenestro. « Kiom da fojoj vi parolis pri la neforgesebla sperto, kiu eblis por niaj infanoj, se ni venus ĉi tien ? Via filo jam scipovas la lingvon pli bone ol vi. Tiuj virinoj akceptas lin, kvazaŭ unu el ili. Roĉjo verŝajne havos sperton ĉi tie pli profundan ol io ajn, kion ni estis imagintaj ! Kial vi volas, ke li restu en la domo la tutan tagon ? »

Stefano diris nenion. Li rigardis malfeliĉe sian edzinon dum momento kaj tiam turniĝis al la dormoĉambro kaj kuŝiĝis sur la liton. Li metis sian vizaĝon en kapkusenon, provante elpeli ĉion ĉi el sia menso.

Maria envenis post kelkaj minutoj. Nun dirinte tion, kion ŝi devis, ŝi sentis sin pli trankvila, kaj ŝi sidiĝis apud lin kaj komencis milde karesi lian dorson. « Rigardu, Stefano. Vi estas vivanta vian revon nun. Vi estas ĉi tie. Vi estas faranta la laboron de Dio, kreanta ion gravegan por tiuj ĉi homoj, faranta ion bonan en iliaj vivoj. Stefano, jam dum jaroj vi parolas pri tiu ĉi misio. Pensu pri tio, kiom multe vi planis por ĉio ĉi. Kiom multe vi

preparis. Nun vi estas ĉi tie. Ĉu vi komprenas tion ? Kio estas la problemo ekzakte ? Kial vi malfeliĉas ? »

« Mi volas, ke mia familio estu kun mi. Mi neniam pensis pri tio ĉi, kiel *mia* revo. Tio ĉi estas la laboro de Dio, kaj ĝi estas por la familio Whitley, por ĉiuj ni. »

« Pardonpete, kara, sed vi trompas vin mem. Tio ĉi ja estas via revo. Ĝi estas grava afero inter vi kaj Dio. Sed ĝi apartenas al vi ! Dio neniam diris al mi pri tio, kion Li volas, ke mi faru. Kaj Li neniam parolis al la infanoj. Tamen ni fidis je vi, kaj ni amas vin. Ni estas ĉi tie kun vi, kaj ni volas apogi vin, ĉiuj ni, eĉ Barbara laŭ sia maniero. Sed, kara, ni ne estas vi. Dio ne parolis al ni. Vi devas rememori tion, kaj vi devas doni al ni tempon por kutimiĝi al niaj novaj vivoj. Vi devas doni al ni tempon por ni mem. »

Li volis gardi sian koleron. Lia koro volis daŭre senti sin vundita, sed la longaj karesoj de ŝiaj fingroj trankviligis lin. Ĉio forfandiĝis, kiam ŝi tuŝadis lin tiel ĉi. Ne gravis la mondo ekstere. Li estis sekura en la brakoj de la virino, kiu amis lin. Ŝi pravas, li pensis al si.

« Maria, mi bezonas helpon. »

Esperanto-renkontiĝoj

21-23-a de majo 2016 : 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

16--23-a de julio 2016 : 72-a IJK

Vroclavo, Pollando

23--a de julio 2016: 101-a UK

Nitra, Slovakio

8-10 de oktobro 2016: 23-a ARE

Silver Bay, NY

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo, 30-a de oktobro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 13-a de novembro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 27-a de novembro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Sabato, 12a de decembro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis (supre) — 16:00-22:00

Vendredo, 8-a de januaro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 29-a de januaro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 12-a de februaro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 26-a de februaro 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 11-a de marto 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 25-a de marto 2015 ĉe Resto Végo St-Denis

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>. **Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien)** : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Nicolas Viau (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Nicolas Viau (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2015.11.20
3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !
Visitez notre site web !
www.esperanto.qc.ca

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

